

La Sutro de Granda Perfekta Nirvano

(konciza traduko)

trad. YAMAGUTI Sin'iti

[1. en Magado]

(1) Tiel mi aŭdis:

Iam la Bagavato¹ restis sur la monto Vulturpinto proksima al Raĝagriho².

Ĝuste tiam Aĝatasattu, la reĝo de Magado kaj filo de Vajdehi³, deziris konkeri la najbaran regnon Vriĝion. Li diris jene: “Kiom ajn forta kaj prospera Vriĝio estas, mi nepre pereigu Vriĝion! Mi nepre ekstermu la vriĝianojn!”

(2) Aĝatasattu ordonis al Vassakara⁴, ministro de Magado: “Iru al la Bagavato, kaj metu vian kapon ĉe liajn piedojn. Kaj en mia nomo demandu lin, ĉu li estas libera de malsano kaj aflikto, estas senzorga, forta, kaj vivas en komforto. Poste diru al li: ‘Sinjoro, la reĝo de Magado, Aĝatasattu, volas ataki Vriĝion. Li diris: «Mi ruinigos Vriĝion, kiom ajn potenca ĝi estas. Mi detruos Vriĝion, mi ekstermos la vriĝianojn.»’ Bone komprenu kaj raportu al mi tion, kion la Bagavato respondos al vi. Ĉar Tatagatoj⁵ ne parolas false.”

(3) “Jes, via Moŝto,” diris Vassakara en konsento kun Aĝatasattu. Kaj li ordonis pretigi belajn ĉarojn. Li veturis de Raĝagriho cele al Vulturpinto, akompanate de ceteraj subuloj. Li iris per ĉaro, kiom ĝi povis veturi, kaj poste elĉariĝinte, piede proksimiĝis al Vulturpinto. Post interŝanĝo de ĝentila saluto kun la Bagavato kaj impresigaj agrablaj vortoj, li sidiĝis flanke kaj diris al la Bagavato:

“Vi, Gotamo, la reĝo de Magado metas sian kapon ĉe viajn piedojn kaj demandas, ĉu vi estas libera de malsano kaj aflikto, estas senzorga, forta, kaj

¹ Palie *Bhagavaa*. Unu el la dek honoraj titoloj atribuitaj al Budho. La signifo estas “honorato en la mondo”.

² La ĉefurbo de Magado, unu el la dek ses grandaj regnoj tiamaj en Hinda subkontinento.

³ Edzino de Bimbisara (antaŭa reĝo de Magado) kaj patrino de Aĝatasattu.

⁴ Li apartenas al bramana kasto, la plej supera klaso en la hinda socio; tio signifas, ke li, laŭ la hinda kulturo, superas la reĝon kaj ankaŭ Ŝakjamunion, kiu devenas de kŝatria kasto.

⁵ Palie *Tathāgata*. Unu el la dek honoraj titoloj atribuitaj al Budho. La signifo estas “veninto el (irinto al) tieleco”.

vivas en komforto. La reĝo deziras konkeri la najbaran regnon Vriĝion. Li diris jene: 'Kiom ajn forta kaj prospera Vriĝio estas, mi nepre pereigu Vriĝion! Mi nepre ekstermu la vriĝianojn!'

(4) Tiam respektinda Anando staris malantaŭ la Bagavato, ventumante lin, kaj li alparolis Anandon ĉi tiel: "Anando, ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj ofte kunvenas kaj havas multajn konferencojn?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili ofte kunvenas kaj havas multajn konferencojn, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos.[1] Kaj ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj konkorde kunvenas, konkorde stariĝas, kaj konkorde faras farendraĵojn?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili konkorde kunvenas, konkorde stariĝas, kaj konkorde faras farendraĵojn, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos. [2] Kaj ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj ne enkondukas novajn regulojn, ne nuligas ĝisnunajn regulojn, sed agadas tiel, kiel ili agadis ĝis nun?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili ne enkondukas novajn regulojn, ne nuligas ĝisnunajn regulojn, sed agadas tiel, kiel ili agadis ĝis nun, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos.[3] Kaj ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj montras respekton, honoron kaj estimon al siaj pliaĝuloj, danke omaĝas al ili, kaj konsideras iliajn opiniojn aŭskultindaj?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili montras respekton, honoron kaj estimon al siaj pliaĝuloj, danke omaĝas al ili, kaj konsideras iliajn opiniojn aŭskultindaj, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos.[4] Kaj ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj ne forkaptas virinojn kaj knabinojn nek enfermas ilin en sian domon?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili ne forkaptas virinojn kaj knabinojn nek enfermas ilin en sian domon, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos.[5] Kaj ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj montras respekton, honoron kaj estimon al siaj sanktejoj, ĉu interne aŭ ekstere de sia ĉefurbo, kaj faras oferon al ili laŭ prava maniero kiel ĝis nun?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili montras respekton, honoron kaj estimon al siaj sanktejoj, ĉu interne aŭ ekstere de sia ĉefurbo, kaj faras oferon al ili laŭ prava

maniero kiel ĝis nun, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos.[6] Kaj ĉu vi aŭdis, ke la vriĝianoj protektas kaj gardas Arahantojn laŭ prava maniero, por ke Arahantoj, ĉu nove venintaj aŭ ankoraŭ ne venintaj al ilia teritorio, povu sekure kaj komforte loĝi en ilia teritorio?"

"Jes, mi tiel aŭdis."

"Tiel longe, dum ili protektas kaj gardas Arahantojn laŭ prava maniero, por ke Arahantoj, ĉu nove venintaj aŭ ankoraŭ ne venintaj al ilia teritorio, povu sekure kaj komforte loĝi en ilia teritorio, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos.[7]"

(5) Li alparolis Vassakaran, ministron de Magado, ĉi tiel: "Mi iam restis en la sanktejo Sarandana, proksima al Vajŝalio⁶. Tie mi instruis al la vriĝianoj ĉi tiujn sep kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Tiel longe, dum la sep kondiĉoj daŭre troviĝas inter la vriĝianoj, dum la vriĝianoj restas firmaj en la sep kondiĉoj, ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos."

Ĉi tion aŭskultinte, Vassakara diris al la Bagavato jene: "Vi, Gotamo, kun eĉ nur unu el la sep kondiĉoj ilia prospero estas atendebla kaj ilia malprospero ne venos. Des pli, ke ili gardas ĉiujn sep kondiĉojn. Aĝatasattu, la reĝo de Magado, havas nenian rimedon kontraŭ Vriĝio per milita ago; li povus preni nur diplomatian traktadon por amikiĝi kun ili aŭ diskordigan politikon por detrui ilian konkordon. Nu, Majstro, nun bonvolu doni al ni forpermeson, ĉar ni havas multajn farendajojn."

"Laŭ via volo."

Vassakara stariĝis kaj foriris, kun ĝojo pro la vortoj de la Bagavato.

(6) Baldaŭ post la foriro de Vassakara li alparolis Anandon ĉi tiel: "Iru nun, Anando, alvoki ĉiujn bikŝuojn⁷ loĝantajn en kaj ĉirkaŭ Raĝagriho, ke ili kunvenu al la aŭditorio."

Anando respondis, "Jes, Majstro." Post kiam ĉiuj bikŝuoj kunvenis, li proksimiĝis al la sidloko de la Bagavato, riverencis, kaj ekstaris flanke de la

⁶ La ĉefurbo de Vriĝio, unu el la dek ses grandaj regnoj tiamaj en Hinda subkontinento.

⁷ Palie *bhikkhu*. budhisma monaĥo (PIV). La origina signifo estas "almozulo". Malsame al laikaj budhanoj, bikŝuoj ne havas hejmon, nek laboras, sed nur ekzercas sin. La nocio de "monaĥo" estas pli ĝenerala ol tiu de "bikŝuo".

Bagavato. Kaj li diris, “La samgo⁸ de bikŝuoj estas kunveninta. Bonvolu veni al la aŭditorio laŭ via bontrovo.”

La Bagavato stariĝis, iris al la aŭditorio, sidiĝis sur sian destinitan lokon, kaj alparolis la bikŝuojn ĉi tiel:

“Vi bikŝuoj, nun mi klarigu al vi sep kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Atente aŭskultu min kaj bone pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

“Vi bikŝuoj, tiel longe, dum vi ofte kunvenas kaj havas multajn konferencojn, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[1]”

“Tiel longe, dum vi konkorde kunvenas, konkorde stariĝas, kaj konkorde faras farenaĵojn, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos. [2]”

“Tiel longe, dum vi ne enkondukas novajn regulojn, ne nuligas ĝisnunajn regulojn, sed lernas tiel, kiel viaj antaŭuloj lernis, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[3]”

“Tiel longe, dum vi montras respekton, honoron kaj estimon al viaj antaŭuloj, kiuj estas spertaj, forlasintaj sian hejmon antaŭlonge, veteranaj, kaj gvidantaj la samgon, dum vi danke omaĝas al ili kaj konsideras iliajn opiniojn aŭskultindaj, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[4]”

“Tiel longe, dum vi ne estas regataj de avidemo, kiu kaŭzas sansaron⁹, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[5]”

“Tiel longe, dum vi volas loĝi en trankvila arbaro, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[6]”

“Tiel longe, dum vi firmigas vin en atentemo, por ke virtaj fratoj povu veni al vi kaj loĝu trankvile kun vi, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[7]”

“Tiel longe, dum tiuj ĉi sep kondiĉoj daŭre troviĝas inter vi bikŝuoj, dum vi restas firmaj en tiuj ĉi sep kondiĉoj, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.”

⁸ Palie *saṅgha*. La originala signifo estas “komunumo”. En budhismo samgo, nome de komunumo de bikŝuoj estas unu el la tri trezoroj respektataj. (Aliaj du estas Budho kaj darmo.)

⁹ Palie *saṃsāra* kaj sanskrite *saṃsāra*. Laŭ hindua pensmaniero, ĉiuj vivaĵoj post sia korpa morto ree naskiĝas kiel alia vivaĵo (ne nepre kiel homo, sed kiel dio aŭ besto; tio dependas de antaŭmortaj agoj bonaj aŭ malbonaj). Tiu ĉi ideo estas ofte bilde prezentata en “rado de vivo”, ĉar la procezo daŭras eterne, kvazaŭ cikla movo de rado.

(7) “Mi klarigu al vi ankoraŭ aliajn sep kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Atente aŭskultu min kaj bone pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

“Tiel longe, dum vi ne absorbiĝas en laborado[1], ne plezuras ĉe interparolado[2], ne plezuras ĉe dormo[3], ne plezuras ĉe societemo[4], ne havas malbonajn dezirojn[5], ne havas malbonajn amikojn[6], kaj ne haltas duonvoje pro ia bagatela atingo[7], via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.”

(8) “Mi klarigu al vi ankoraŭ aliajn sep kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Atente aŭskultu min kaj bone pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

“Tiel longe, dum vi tenas puran fidon[1], scias moralan honton[2], timas malĝustan agon[3], lernas multon[4], fervore klopodas[5], firmigas atentemon[6], kaj tenas saĝon[7], via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.”

(9) “Mi klarigu al vi ankoraŭ aliajn sep kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Atente aŭskultu min kaj bone pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

“Tiel longe, dum vi praktikas sep faktorojn de vervekiĝo¹⁰, nome atentemon[1], esploron de darmo[2], diligentecon[3], plezuron[4], leĝerecon[5], koncentradon[6] kaj trankvilon[7], via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.”

(10) “Mi klarigu al vi ankoraŭ aliajn sep kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Atente aŭskultu min kaj bone pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

“Tiel longe, dum vi kultivas sep pensojn, ke ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj[1], ke ĉiu ekzisto ne havas atmanon[2]¹¹, ke ĉiuj formitaĵoj estas malpuraj[3], ke ĉiuj formitaĵoj estas evitendaj[4], ke ĉiuj formitaĵoj estas forlasendaj[5], ke ĉiuj deziroj estas forĵetendaj[6], kaj ke transcende de

¹⁰ Ĉi tiuj sep klarigas diversajn aspektojn de vervekiĝo kaj samtempe faras la kernon de budhisma praktikado. (vervekiĝo kaj praktikado ne estas apartaj aferoj.)

¹¹ Palie *attā*. la koncepto de 'mi' kaj ties esenca, kosma, kaj eterna ekzistado. En hinduismo, atmano estas la esenca animo. En budhismo, atmano estas unu el la ĉefaj falsaj vidpunktoj kaj kredoj de homoj en ĉi tiu mondo. (budhisma terminaro de UEA-vikio)

formitaĵoj esats nirvano aŭ plena halto[7], via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.”

(11) “Mi klarigu al vi ses kondiĉojn, kiuj ne kondukas al malprospero. Atente aŭskultu min kaj bone pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

“Tiel longe, dum vi praktikas korpe amoplenajn farojn al viaj kolegoj kaŝe aŭ malkaŝe, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[1]”

“Tiel longe, dum vi praktias parole amoplenajn farojn al viaj kolegoj kaŝe aŭ malkaŝe, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[2]”

“Tiel longe, dum vi praktias mense amoplenajn farojn al viaj kolegoj kaŝe aŭ malkaŝe, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[3]”

“Tiel longe, dum vi ricevas sendistinge oferaĵojn per ĝusta ago, kiom ajn malmulte en via malgranda bovlo, kaj dividas ilin kun viaj kolegoj, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[4]”

“Tiel longe, dum vi restas kun viaj kolegoj kaŝe aŭ malkaŝe sub diversaj ŝiloj¹², kiuj estas sen difektoj, sen truoj, sen makuloj, sen malpuraĵoj, libervolaj, laŭdataj de saĝuloj, liberaj de alkroĉiĝo, kaj kondukas al ĝusta koncentrado, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[5]”

“Tiel longe, dum vi restas kun viaj kolegoj kaŝe aŭ malkaŝe kun ĝusta vido, kiu estas sankta, utila al liberiĝo kaj kondukas al halto de dukho¹³, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.[6]”

“Tiel longe, dum tiuj ĉi ses kondiĉoj daŭre troviĝas inter vi bikŝuoj, dum vi restas firmaj en tiuj ĉi ses kondiĉoj, via prospero estas atendebla kaj via malprospero ne venos.”

(12) La Bagavato plurfoje faris la jenan predikon, dum li restis sur la monto Vulturpinto proksima al Raĝagriho:

“Ŝilo estas ĉi tia.”

“Koncentro estas ĉi tia.”

¹² Palie *sīla*. Regulo de la budhisma moralo, propravole akceptata (PIV). La plej fundamentaj ŝiloj estas: ne mortigi, ne ŝteli, ne adulti, ne mensogi, ne preni ebriigan aŭ venenan manĝaĵon kaj trinkaĵon.

¹³ Palie *dukkha*. Ĝis nun oni (inkluzive de la tradukinto mem) ofte tradukis ĝin per “sufero”, imitante anglalingvan “suffering” kaj ĉinlingvan “苦”. Sed “sufero” montras nur limigitan flankon de *dukkha*. Ĝia originala signifo estas “aĉa truo”. Budhismo alprenis tiun ĉi vorton por montri nekontenteman menso-staton pro tio, ke io ne iras laŭ “mia” volo. La plej ĉefaj dukhoj estas: naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo, kaj morto.

“Saĝo estas ĉi tia.”

“Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj¹⁴, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido¹⁵.”

(13) Post kiam la Bagavato restis en Raĝagriho tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al Ambalatiko.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Ambalatiko, kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon ĉe la vilao de la reĝo de tiu ĉi regiono por plurfoje fari la predikon kiel antaŭe.

(14) Post kiam la Bagavato restis en Ambalatiko tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al Nalando.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Nalando, kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon en la mangarba ĝardeno posedata de Pavarika, proksima al Nalando.

(15) Tiam respektinda Sariputta proksimiĝis al la Bagavato, riverencis lin kaj sidiĝis apud li. Li diris al la Bagavato tiel:

“Majstro, mi pensas, ke ĉu ŝramano, ĉu bramano, neniu pli klare konis, konas, konos superan vervekiĝon ol la Bagavato.”

“Sariputta, via parolo atestas vian ekzaktan komprenon, kaj ĝi sonas impona, kvazaŭ leono rorus. Sed rilate al ĉiuj tiuj Bagavatoj, kiuj estas Arahantoj kaj Vervekiĝintoj, aperintaj dum longa periodo estinta, ĉu vi havas rektan personan konon, pri ilia ŝilo, ilia darmo, ilia saĝeco, ilia vivado kaj ilia liberiĝo?”

“Ne, Majstro.”

¹⁴ Palie *kilesa*. Kaŭzo de malbona tendenco de la homa koro kaj obstaklo por atingi bodion (PIV). La negativa efiko de avareco, malamo kaj malvido al la menso de individuo, kiu malhelpas la efektiviĝon de iluminiĝo (budhisma terminaro de UEA-vikio).

¹⁵ Manko de la saĝo, kiu povas vidi la veron, interalie la kvar noblajn verojn pri dukho. Malvido faras la fundamentan kaŭzon de sasnsaro aŭ senĉesa daŭro de dukho.

“Do, rilate al ĉiuj tiuj Bagavatoj, kiuj estas Arahantoj kaj Vervekiĝintoj, aperontaj dum longa periodo estonta, ĉu vi havas rektan personan konon, pri ilia ŝilo, ilia darmo, ilia saĝeco, ilia vivado kaj ilia liberiĝo?”

“Ne, Majstro.”

“Do, rilate al mi, la Bagavato, kiu estas Arahanto kaj Vervekiĝinto en la nuna tempo, ĉu vi havas rektan personan konon, pri mia ŝilo, mia darmo, mia saĝeco, mia vivado kaj mia liberiĝo?”

“Ne, Majstro.”

“Se tiel, al vi mankas saĝo por koni la menson de aliuloj, nome de Arahantoj kaj Vervekiĝintoj estintaj, estontaj, estantaj. Do, kial vi diris, ke vi pensas, ke ĉu ŝramano, ĉu bramano, neniu pli klare konis, konas, konos superan vervekiĝon ol mi?”

(16) “Majstro, mi ne havas la saĝon por koni la menson de aliuloj, nome de Arahantoj kaj Vervekiĝintoj estintaj, estontaj, estantaj. Sed mi rezonas pri darmo. Ekzemple, mi supozu, ke troviĝas unu urbo, kies bastiono, remparo kaj pordo estas firmaj; saĝa kaj talenta gardisto bone gardas la kastelon, por ke neniu fremdulo povu trairi eĉ tra trueton aŭ fendeton de la remparo. Li ankaŭ trovas neniun trueton aŭ fendeton de la remparo, patrolante tra la tuta urbo. Tiam li povas pensi, ke ĉiuj vivaĵoj povas eniri en la kastelon aŭ eliri el ĝi nur tra la unusola pordo de li gardata. Tiel same mi povas rezoni pri darmo.

Ĉiuj Arahantoj kaj Vervekiĝintoj estintaj forĵetis kvin obstaklojn¹⁶, eksciis malpuraĵojn akompanantajn menson, starigis sian menson sur kvar specoj de meditado¹⁷, praktikis la sep faktorojn de vervekiĝo, kaj atingis la plej superan vervekiĝon. Tiel same faros ĉiuj Arahantoj kaj Vervekiĝintoj estontaj, kaj nun mia Majstro faras.”

(17) Dume la Bagavato restis en la mangarba ĝardeno de Pavarika kaj plurfoje faris la jenan predikon:

“Ŝilo estas ĉi tia.”

“Koncentro estas ĉi tia.”

“Saĝo estas ĉi tia.”

“Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meriton.”

¹⁶ Kvin kleŝoj, kiuj malhelpas praktikadon, nome avido, kolero, deprimiĝo, ekscitiĝo, kaj manko de fido.

¹⁷ Meditado pri korpa malpureco, pri la tezo ke ĉiuj formitaĵoj portas dukhon, pri la tezo ke ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj, pri la tezo ke ĉiu ekzisto ne havas atmanon.

“Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meriton.”

“Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido.”

(18) Post kiam la Bagavato restis en Nalando tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al la vilaĝo Pataliputto.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Pataliputto, kune kun la granda samgo.

Upasakoj¹⁸ en Pataliputto, aŭdinte, ke la Bagavato restas en ilia vilaĝo, proksimiĝis al la Bagavato, riverencis lin kaj sidiĝis apud li. Ili diris al la Bagavato tiel:

“Majstro, bonvolu ripozi ĉe nia ripozejo.”

La Bagavato konsentis la peton per silento¹⁹. Laikaj disĉiploj stariĝis, riverencis lin, ĉirkaŭiris lin dekstrume, kaj iris al la ripozejo. Tie ili sternis tapiŝon, aranĝis sidkusenojn, metis akvurnojn kaj preparis olelampojn. Poste ili denove vizitis la Bagavaton kaj petis, ke li iam ajn venu al la ripozejo.

Vespere la Bagavato, vestinte sin per roboj kaj preninte bovlon, vizitis la ripozejon kun la samganoj. Tie la Bagavato purigis siajn piedojn kaj sidiĝis ĉe la centra kolono fronte al oriento. Aliaj bikŝuoj ankaŭ purigis siajn piedojn kaj sidiĝis proksime al la okcidenta flanko malantaŭ la Bagavato. Laikaj disĉiploj ankaŭ purigis siajn piedojn kaj sidiĝis proksime al la orienta flanko antaŭ la Bagavato.

(19) La Bagavato diris al la laikaj disĉiploj:

“Tiuj, al kiuj mankas ŝiloj, renkontas la jenajn kvin danĝerojn: la unua, ili perdos sian bonhavaĵon pro sia maldiligento; la dua, ili havos malbonan reputacion; la tria, ili devos timeme alproksimiĝi al aliaj homoj, ĉu al nobeloj, ĉu al bramanoj, ĉu al komercistoj aŭ ĉu al ŝramanoj; la kvara, ili mortos kun maltrankvilo; la kvina, ili post la morto renaskiĝos en narako, sfero plena de doloro, malbono kaj pereco.”

(20) “Tiuj, kiuj tenas ŝilojn, renkontos la jenajn kvin avantaĝojn: la unua, ili kolektos grandan bonhavaĵon pro sia diligento; la dua, ili havos bonan reputacion; la tria, ili povos memfide alproksimiĝi al aliaj homoj, ĉu al nobeloj,

¹⁸ Palie *upāsaka*. Laikaj budhanoj, kiuj subtenas la vivon de bikŝuoj/bikŝuinoj.

¹⁹ Tiu ĉi maniero de konsento aŭ aprobo estas kutimo de pratempa samgo. Tre probable la kutimo devenis de la malemo kontraŭ senbezona babilado.

ĉu al bramanoj, ĉu al komercistoj aŭ ĉu al ŝramanoj; la kvara, ili mortos kun trankvilo; la kvina, ili post la morto renaskiĝos en ĉiela mondo.”

(21) La Bagavato daŭrigis sian darman parolon por la laikaj disĉiploj, instruante, admonante, kuraĝigante kaj ĝojigante ilin ĝis malfrua nokto. Fine li diris, “Estas jam malfrue. Bonvolu hejmeniri laŭ via bontrovo.”

“Jes, Majstro.” Ili stariĝis, riverencis la Bagavaton, ĉirkaŭiris lin dekstrume, kaj foriris. Post ilia foriro la Bagavato eniris en neokupitan ĉambron.

(22) Tiutempe Sunidha kaj Vassakara, ministroj de Magado, iniciatis konstruon de citadelo en la vilaĝo Pataliputto por prepari militon kontraŭ Vriĝio.

En la vilaĝo multaj, eĉ miloj da dioj okupis diversajn terenojn. En terenoj, kie dioj kun granda potenco okupis, reĝoj kaj ministroj kun granda potenco deziris havi sian loĝejon; en regionoj, kie dioj kun meza potenco okupis, reĝoj kaj ministroj kun meza potenco deziris havi sian loĝejon; en terenoj, kie dioj kun malgranda potenco okupis, reĝoj kaj ministroj kun malgranda potenco deziris havi sian loĝejon.

La Bagavato rigardis per siaj ĉielaj okuloj, puraj kaj superhomaj, ke miloj da dioj okupis diversajn terenojn de la vilaĝo. Post sunleviĝo li ellitiĝis kaj demandis Anandon: “Kiu konstruas la citadelon en Pataliputto?”

“Sunidha kaj Vassakara, ministroj de Magado, por prepari militon kontraŭ Vriĝio.”

“Ili kvazaŭ estus konsiliĝintaj kun tridek tri dioj²⁰. Mi rimarkis per miaj puraj kaj superhomaj okuloj, ke multaj dioj okupas diversajn terenojn de Pataliputto. Dum la vilaĝo estas nobla loko, kaj dum ĝi estas centro de komerco, ĝi fariĝos la ĉefurbo de Magado kiel vojkruciĝo de homaj kolektiĝoj kaj disiĝoj. Sed estas certe, ke en Pataliputto okazos katastrofo pro tri kaŭzoj: fajro, akvo kaj malkonkordo.”

(23) Sunidha kaj Vassakara venis kaj proksimiĝis al la Bagavato. Post interŝanĝo de ĝentila saluto kun li kaj impresaj agrablaj vortoj, ili sidiĝis flanke kaj alparolis la Bagavaton jene: “Majstro Gotamo, bonvolu akcepti nian inviton por manĝado, kune kun la samganoj.”

²⁰ Dioj loĝantaj en la dua malsupera tavolo el la ses diaj sferoj. Ilia ĉefo estas Indro (alinome Ŝakro).

La Bagavato konsentis la peton per silento. Sunidha kaj Vassakara reiris al sia loĝejo por prepari la plej bonajn manĝaĵojn molajn kaj durajn. Kaj ili anoncis, “Majstro Gotamo, estas la tempo. Manĝaĵoj estas pretaj.”

Antaŭtagmeze la Bagavato, vestinte sin per roboj kaj preninte bovlon, vizitis ilian loĝejon kun la samganoj. Kaj la Bagavato sidiĝis sur la loko preparita por li. Sunidha kaj Vassakara mem regalis la Budhon kaj la samganojn sufiĉe per la plej bonaj manĝaĵoj. Post kiam ĉiuj finmanĝis, la Bagavato montris sian kontenton per la jena verso:

Veraj saĝuloj
En sia loĝloko
Regalas praktikantojn
Ŝilotenantajn kaj memregantajn.
Al tieaj dioj
Oferu la meriton de donaco.
Dioj, estante respektataj kaj regalitaj,
Respektas kaj regalas saĝulojn.
Saĝulojn amas dioj,
Kvazaŭ patrino siajn infanojn.
Homoj amataj de dioj
Vidas diversajn feliĉojn.

Tiamaniere la Bagavato montris sian kontenton al Sunidha kaj Vassakara, kaj foriris.

(24) Sunidha kaj Vassakara postsekvis la Bagavaton, pensante: “La pordo, tra kiu Gotamo hodiaŭ pasis, estos nomata Gotamo-pordo; la vadejo, de kiu li transiris Gangon, estos nomata Gotamo-vadejo. Fakte tiel okazis pri la pordo.

Kiam la Bagavato venis al Gango, ĝi estis plena de akvo ĝis la rando de la bordo, tiel ke korvoj povis trinki el ĝi. Kelkaj mendis boaton aŭ flosilon, kaj aliaj mem faris flosilon el bambuo, por transiri al la alia bordo.

La Bagavato tamen kun la samganoj malaperis de tiu ĉi bordo kaj aperis sur la alia bordo tiel rapide, kvazaŭ fortulo etendus kaj fleksus sian brakon. Li vidis aliajn homojn mendi boaton aŭ flosilon aŭ mem fari flosilon. Li tiam diris jene:

“Dum aliaj kunligas flosilojn,
Tiuj, kiuj konstruas ponton,
Forlasante marĉon
Transiras maron kaj riveregon;
Ja estas saĝaj transirantoj.”

[2. Vojaĝo al Vajŝalio]

(25) La Bagavato diris al respektinda Anando, "Venu, Anando, ni iru al la vilaĝo Kotio."

"Jes, Majstro."

Kaj la Bagavato iris al Kotio, kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon.

La Bagavato diris al la bikŝuoj jene:

"Ĝis nun mi kaj vi dum longa tempo migradis kaj ripetadis sansaron, ĉar ni ne komprenis kaj klarvidis la kvar sanktajn verojn; kio estas la kvar? La unua vero pri dukho; la dua vero pri estiĝo de dukho; la tria vero pri halto de dukho; la kvara vero pri vojo al halto de dukho."

"Sed nun la kvar veroj estas komprenitaj kaj klarviditaj. Ni fortranĉis soifon al ekzisto. Kio kondukas al ekzisto, estas neniigita. Estas neeble, ke ni renaskiĝu."

La Bagavato konklude diris jene:

"La kvar sanktaj veroj

Ne estis viditaj tiel, kiel ili estas.

Pro tio ni en diversaj vivoj

Ripetadis sansaron dum longa tempo.

Sed ili estas viditaj,

Kaj forigita estas tio, kio kondukas al ekzisto;

Radiko de dukho estas tranĉita,

Tial renaskiĝo ne eblas."

La Bagavato plurfoje faris la jenan predikon, dum li restis en Kotio:

"Ŝilo estas ĉi tia."

"Koncentro estas ĉi tia."

"Saĝo estas ĉi tia."

"Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meriton."

"Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meriton."

"Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido."

(26) Post kiam la Bagavato restis en Kotio tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al la vilaĝo Natiko.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Natiko, kune kun la granda samgo. Tie li ekloĝis en domo el brikoj.

Tiam respektinda Anando proksimiĝis al la Bagavato, riverencis lin kaj sidiĝis apud li. Li diris al la Bagavato tiel:

“Majstro, la bikŝuo nomata Salha forpasis en Natiko. Kien li iris? Kiel statas lia posta vivo? Kaj kiel estas ankaŭ pri aliaj, nome la bikŝuino Nanda, la laika disĉiplo Sudatta, la laika disĉiplino Suĵata, kiuj forpasis en Natiko? Kaj pri la laikaj disĉiploj nomataj Kukkuta, Kalimba, Nikata, Katissaha, Tuttha, Santuttha, Bhadda, Subhadda?”

(27) “La bikŝuo Salha neniigis diversajn kleŝojn, tiel ke li bone ekkonis, klarvidis kaj atingis la senkleŝan liberiĝon de sia menso kaj tiun de sia saĝo en la nuna vivo [Li fariĝis arahanto²¹].”

“La bikŝuino Nanda fariĝis transformiĝinto per neniigo de la unuaj kvin katenoj, kaj eniros en nirvanon, jam ne revenonte al tiu ĉi mondo [Ŝi fariĝis ne-revenonto²²]. “

“La laika disĉiplo Sudatta fariĝis unufoja-revenonto²³, per neniigo de la tri katenoj kaj per malmultigo de avidemo, kolero kaj malvido, kaj revenos al tiu ĉi mondo nur unu fojon kaj finos dukhon.”

“La laika disĉiplino Suĵata fariĝis fluo-enirinto²⁴, per neniigo de la tri katenoj, kaj progresos al pli alta stadio de vervekiĝo, neniam enfalonte en mizeron, nepre sukcesonte.”

“La laika disĉiplo Kukkuta fariĝis transformiĝinto per neniigo de la unuaj kvin katenoj, kaj eniros en nirvanon, jam ne revenonte al tiu ĉi mondo.”

“La laikaj disĉiploj Kalimba, Nikata, Katissaha, Tuttha, Santuttha, Bhadda, Subhadda, kaj aliaj pli ol 50 laikaj disĉiploj, kiuj forpasis en Natiko, same fariĝis transformiĝintoj per neniigo de la unuaj kvin katenoj, kaj eniros en nirvanon, jam ne revenonte al tiu ĉi mondo.”

²¹ Palie *arahant*: tiu, kiu meritas oferon kaj respekton, atinginta la plej superan stadion de vekigi.

²² Palie *anāgāmin*: laŭlitere “ne-reveno”. Sanktulo atinginta la duan stadion de vervekiĝo.

²³ Palie *sakadāgāmin*: laŭlitere “unufojo-reveno”. Sanktulo atinginta la trian stadion de vervekiĝo.

²⁴ Palie *sotāpanna*: laŭlitere “eniro-fluo”. Sanktulo atinginta la kvaran stadion de vervekiĝo.

“Pli ol 90 laikaj disĉiploj, kiuj forpasis en Natiko, fariĝis unufoja-revenontoj, per neniigo de la tri katenoj kaj per malmultigo de avidemo, kolero kaj malvido, kaj revenos al tiu ĉi mondo nur unu fojon kaj finos dukhon.”

“Pli ol 500 laikaj disĉiploj, kiuj forpasis en Natiko, fariĝis fluo-enirintoj, per neniigo de la tri katenoj, kaj progresos al pli alta stadio de vervekiĝo, neniam enfalonte en mizeron, nepre sukcesonte.”

(28) “Sed vere, Anando, estas neniom strange, ke homoj mortas. Se vi ĉiam demandas al mi, kiel tiuj aŭ aliaj statas post morto, tio ĝenas min. Do, Anando, mi donas al vi la instruon nomatan «la Spegulo de Darmo», per kiu sanktaj disĉiploj, se ili deziras, povas klarigi pri si mem tiel: ‘Al mi estas finita renaskiĝo en narako, en besta utero kaj en sfero de malsatuloj; finita estas sfero de doloro, malbona vojo kaj pere. Mi estas fluo-enirinto, kaj progresos al pli alta stadio de vervekiĝo, neniam enfalonte en mizeron, nepre sukcesonte.’”

(29) “Kio estas, do, «la Spegulo de Darmo»?”

“Sanktaj disĉiploj tenas absolutan fidon al Budho ĉi tiel: ‘La Bagavato estas Arahanto, Vervekiĝinto, Pleniginto, Forlasinto, Kompreninto, Sensuperulo, Majstra Trejnisto, Gvidanto de dioj kaj homoj, kaj Budho.’”

“Ili tenas absolutan fidon al Darmo ĉi tiel: ‘La Darmo predikita de la Bagavato, estas tio, kion ni mem devas kompreni, kio ne estas limigita de tempo, kio taŭgas por deklari «venu vidi!», kio gvidas nin, kaj kio devas esti konata de saĝuloj.’”

“Ili tenas absolutan fidon al Samgo ĉi tiel: ‘La aro de disĉiploj bone praktikas, rekte praktikas, praktikas por ĝusta rezonado, prave praktikas; la aro de disĉiploj, kiuj atingis iun el la ok stadioj²⁵, meritas oferon, meritas respektan saluton, estante la plej supera kampo de feliĉo en la mondo.’”

“Ili senmanke sekvas diversajn ŝilojn, kiuj estas amataj de sanktuloj, senrompaj, sentruaj, senmakulaj, liberdonantaj, laŭdataj de saĝuloj, ne alkroĉendaj, kaj kondukantaj al meditado.”

“Jen, tio ĉi estas la instruo «la Spegulo de Darmo. Per ĝi sanktaj disĉiploj, se ili deziras, povas klarigi pri si mem tiel: ‘Al mi estas finita renaskiĝo en narako, en besta utero kaj en sfero de malsatuloj; finita estas sfero de doloro, malbona vojo kaj pere. Mi estas fluo-enirinto, kaj progresos al pli alta stadio de vervekiĝo, neniam enfalonte en mizeron, nepre sukcesonte.’”

²⁵ Komenco de fluo-enirinto, plenigo de fluo-enirinto, komenco de unufoja-revenonto, plenigo de unufoja-revenonto, komenco de ne-revenonto, plenigo de ne-revenonto, komenco de arahanto, plenigo de arahanto.

La Bagavato plurfoje faris la jenan predikon, dum li restis en la brika domo en Natiko:

“Ŝilo estas ĉi tia.”

“Koncentro estas ĉi tia.”

“Saĝo estas ĉi tia.”

“Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido.”

(30) Post kiam la Bagavato restis en Natiko tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al Vajŝalio.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Vajŝalio, kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon en la mangarba ĝardeno posedata de Ambapali.

Li alparolis la bikŝuojn ĉi tiel:

“Vi bikŝuoj devas teni atentemon kaj klaran komprenon. Tio estas mia instruo.”

“Kiel bikŝuo tenu atentemon? Ĉe via korpo vi devas observi vian korpon, fervore teni klaran komprenon kaj atentemon, kaj ekskludi avidemon kaj malĝojon rilate al la mondo. Ĉe viaj sentoj vi devas observi viajn sentojn, fervore teni klaran komprenon kaj atentemon, kaj ekskludi avidemon kaj malĝojon rilate al la mondo; ĉe via menso kaj ĉe diversaj ekzistaĵoj tiel same. Tiamaniere bikŝuo devas teni atentemon.”

“Kiel bikŝuo tenu klaran komprenon? Vi devas agi, ĉu iri antaŭen aŭ malantaŭen, kun klara kompreno. Vi devas vidi antaŭen aŭ flanken, fleksi aŭ etendi vian korpon, teni robojn kaj bovlon, manĝi, trinki, maĉi, leki, feki, pisi, marŝi, stariĝi, sidiĝi, dormi, vekiĝi, paroli, silenti, kun klara kompreno. Tiamaniere bikŝuo devas teni klaran komprenon.”

“Vi bikŝuoj devas teni atentemon kaj klaran komprenon. Tio estas mia instruo.”

(31) Tiam Ambapali, hetajro, aŭdis, ke la Bagavato nun restas en ŝia mangarba ĝardeno. Do ŝi ordonis pretigi belajn ĉarojn. Ŝi veturis de Vajŝalio cele al sia ĝardeno, akompanate de siaj subuloj. Ŝi iris per ĉaro, kiom ĝi povis veturi, kaj poste elĉariĝinte, piede proksimiĝis al la Bagavato. Post riverenco ŝi

sidiĝis flanke de la Bagavato, kiu per sia prediko instruis, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis ŝin.

Ŝi diris al la Bagavato, “Majstro, bonvolu akcepti nian inviton por manĝado morĝaŭa, kune kun la samganoj.”

La Bagavato konsentis la peton per silento. Ŝi stariĝis, riverencis lin, ĉirkaŭiris lin dekstrume kaj foriris.

Kelkaj liĉavianoj²⁶ aŭdis, ke la Bagavato nun restas en la mangarba ĝardeno de Ambapali. Do ili pretigis belajn ĉarojn kaj veturis de Vajŝalio. Kelkaj el ili ŝmiris siajn haŭton, vestaĵon kaj akcesoraĵojn per bluo, kaj aliaj per flavo, aŭ per ruĝo, aŭ per blanko.

Tiam la ĉaroj de Ambapali kaj tiuj de la junaj liĉavianoj hazarde kunfrapiĝis, akso kontraŭ akson, rado kontraŭ radon, jugo kontraŭ jugon. La liĉavianoj plendis al ŝi, “He, Ambapali, kial viaj ĉaroj trafis la niajn?”

“Certe vi pravas, noblaj princoj. Mi hastis, ĉar mi invitis la Bagavaton kaj la bikŝuojn al manĝado.”

“Se tiel, Ambapali, bonvolu cedi al ni la rajton de invito per cent mil ormoneroj.”

“Ne, mi ne volas tion, eĉ se vi donus la tutan terenon de Vajŝalio.”

La liĉavianoj klakis siajn fingrojn pro bedaŭro kaj grumblis, “Ve, ni estas venkitaj de virino.” Kaj ili daŭrigis veturadon al la ĝardeno.

La Bagavato vidis ilin proksimiĝi kaj diris al la bikŝuoj, “Rigardu bone tiujn liĉavianojn, se vi ankoraŭ ne vidis la tridek tri diojn. Kaj komparu la liĉavianojn kun la dioj.”

La Bagavato akceptis kaj instruis ilin same kiel Ambapalin, kaj ili petis lin akcepti ilian inviton al manĝado.

La Bagavato respondis, “Ambapali jam invitis min.”

La liĉavianoj denove klakis siajn fingrojn pro bedaŭro kaj grumblis, “Ve, ni estas venkitaj de virino.” Tamen ili ĝojis pro la instruo, stariĝis, riverencis la Bagavaton, ĉirkaŭiris lin dekstrume, kaj foriris.

(32) En la sekva mateno Ambapali ordonis siajn subulojn prepari la plej bonajn manĝaĵojn molajn kaj solidajn kaj anonci al la Bagavato, “Majstro Gotamo, estas la tempo. Manĝaĵoj estas pretaj.”

Antaŭtagmeze la Bagavato, vestinte sin per roboj kaj preninte bovlon, vizitis ŝian loĝejon kun la samganoj. Kaj la Bagavato sidiĝis sur la loko preparita por

²⁶ Liĉavio estas unu el la triboj konsistantaj Vriĝion. Tial ili estas foje nomataj vriĝianoj.

li. Ambapali mem regalis la Budhon kaj la samganojn sufiĉe per la plej bonaj manĝaĵoj.

Post kiam la Bagavato finmanĝis, Ambapali sidiĝis sur pli malalta loko kaj diris al li, “Majstro, mi volas oferi tiun ĉi ĝardenon al la samgo gvidata de la Budho.”

La Bagavato akceptis ĝin; li plue per sia prediko instruis, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis ŝin. Fine la Bagavato stariĝis kaj foriris.

Tiel, la Bagavato plurfoje faris la jenan predikon, dum li restis en la mangarba ĝardeno de Ambapali en Vajŝalio:

“Ŝilo estas ĉi tia.”

“Koncentro estas ĉi tia.”

“Saĝo estas ĉi tia.”

“Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido.”

(33) Post kiam la Bagavato restis en la ĝardeno de Ambapali tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al la vilaĝo Veluvo.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Veluvo, kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon kaj alparolis la bikŝuojn:

“Vi petu de viaj konatoj aŭ amikoj helpon, por ke vi ekzercu vin endome dum pluva sezono²⁷ en iu ajn loko de Vajŝalio. Mi mem tamen restu en tiu ĉi vilaĝo.”

“Jes, Majstro.”

(34) La Bagavato, kiu ekzercis sin endome dum pluva sezono, enfalis en gravan malsanon; morte akra doloro atakis lin. Sed li, tenante atentemon kaj klaran komprenon, ne afliktiĝis kaj eltenis ĝin.

Tiam la Bagavato pensis ĉi tiel: “Ne estus konvene por mi, se mi enirus en nirvanon sen anonci al miaj servantoj, sen doni admonon al la samgo. Mi

²⁷ En Hindio pluva sezono ne estas taŭga por ke bikŝuoj migru de loko al loko, unue ĉar inundo de riveroj malhelpas ilin libere translokiĝi, kaj due ĉar ili ne volis piede treti tiutempe ĝermantajn plantaĵojn kaj naskitajn insektojn surtere. Tial en pluva sezono bikŝuoj restas en unu loko kaj intensive ekzercas sin. (Periodo dependas de loka kondiĉo.)

subpremu ĉi tiun malsanon per forto de volo, konservu la vivprocezon kaj vivu plu.” La Bagavato tiel faris kaj lia malsano kvietiĝis.

Baldaŭ post sia resaniĝo, la Bagavato elvenis el la kuracejo kaj sidiĝis sur sia loko sub ombro de la domo. Respektinda Anando proksimiĝis al la Bagavato, riverencis lin kaj sidiĝis apud li. Li diris al la Bagavato tiel:

“Majstro, al mi ŝajnas, ke la Bagavato resaniĝis. Al mi ŝajnas, ke la Bagavato reakiris sian forton. Kiam mi vidis la malsanon de la Bagavato, mia korpo tute rigidiĝis. Pro la malsano de la Bagavato al mi ne estis klara eĉ direktoj kaj diversaj darmoj ne aperis antaŭ mi. Sed nun mi estas konvinkita, ke la Bagavato ne eniros en nirvanon, ĝis li donos ian instrukcion pri la samgo. Tial mi havas etan esperon.”

(35) “Sed, Anando, kion la samgo esperas de mi? Mi jam klarigis la darmon sendistinge al ĉiuj disĉiploj. Mi, Tatagato, ne havas tian sekretan instruon, kian gvidanto kaŝas en sia mano.”

“Se iu havas intencon, ke li gvidu sian samgon, aŭ ke la samgo dependu de li, li certe ion instrukcios pri la samgo. Sed mi ne havas tian intencon. Kion mi instrukciu pri la samgo? Mi jam sufiĉe maljuniĝis, malfortiĝis, kadukiĝis, travojaĝis homan vivon, kaj atingis la finan etapon. Mi havas 80 jarojn. Kiel malnova ĉaro funkcias volvite de rimenoj, tiel same mi apenaŭ agadas volvite de rimenoj.”

“Kiam Tatagato, fiksante sian atenton al neniuj aspektoj, kaj neniigante diversajn pensojn, restas kun kontemplado al senaspekta menso, la korpo de Tatagato iĝas pli kvieta.”

“Tial, vi faru vin mem via insuleto, via rifuĝejo²⁸, ne serĉante eksteran rifuĝejon; vi faru la darmon via insuleto, via rifuĝejo, ne serĉante alian rifuĝejon. Kiel bikŝuo povas esti sia insuleto, sia rifuĝejo? Kiel la darmo povas esti lia insuleto, lia rifuĝejo?”

“Ĉe via korpo vi devas observi vian korpon, fervore teni klaran komprenon kaj atentemon, kaj ekskludi avidemon kaj malĝojon rilate al la mondo. Ĉe viaj sentoj vi devas observi viajn sentojn, fervore teni klaran komprenon kaj atentemon, kaj ekskludi avidemon kaj malĝojon rilate al la mondo; ĉe via menso kaj ĉe diversaj ekzistaĵoj tiel same. Tiamaniere bikŝuoj faras sin mem sia

²⁸ Palie *saraṇa*. La signifo estas “protekto”, “ŝirmejo” aŭ “rifuĝejo”. Rifuĝoj al la tri trezoroj (budho, darmo, samgo) faras la bazon de budhaniĝo. Cetere, “rifuĝo” ĉi tie signifas ne konfeson de kredo sed vivon sur sekura loko, kvazaŭ iu rifuĝus en insuleton de la riverego Gango, kiam li/ŝi renkontas ĝian inundon.

insuleto, sia rifuĝejo, ne serĉante eksteran rifuĝejon; ili faras la darmon sia insuleto, sia rifuĝejo, ne serĉante alian rifuĝejon.”

“Anando, jam nun kaj ankaŭ post mia forpaso, tiuj, kiuj tiel tenas sin mem kaj la darmon kiel la rifuĝejon, kaj kiuj lernas klaran komprenon kaj atentemon ĉe sia korpo, ĉe sia menso, ĉe siaj sentoj kaj ĉe diversaj ekzistaĵoj, certe fariĝos la plej superaj bikŝuoj.”

[3. Rezigni la Volon Vivi]

(36) Antaŭtagmeze la Bagavato, prenante robon kaj almozbovlon kun si, iris al Vajŝalio por almozpeti. Post la tagmanĝo el la bovlo, li alparolis Anandon, “Kunportu matracon. Ni iru al la sanktejo Ĉapala por pasigi posttagmezan ripozon.”

“Jes, Majstro.”

Anando sekvis la Bagavaton tenante matracon.

(37) Post kiam ili atingis la lokon kaj sidiĝis, la Bagavato diris:

“Vajŝalio estas loko plena de ĝojo; la sanktejo Udena estas loko plena de ĝojo; la sanktejo Gotamoka estas loko plena de ĝojo; la sanktejo Sattamba estas loko plena de ĝojo; la sanktejo Bahuputta estas loko plena de ĝojo; la sanktejo Sarandada estas loko plena de ĝojo; la sanktejo Ĉapala estas loko plena de ĝojo.”

“Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco²⁹, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.”

Kvankam la Bagavato klare aludis kaj sugestis sian intencon, Anando, kvazaŭ lia menso estus kaptita de marao³⁰, ne komprenis tion, kaj sekve ne petis ĉi tiel:

“Majstro, bonvolu resti en tiu ĉi mondo tiom longe, kiom la vivdaŭro de la Bagavato permesas, por la bonfarto kaj feliĉo de la homamaso, pro kompatato al la mondo, por la utilo, bonfarto kaj feliĉo de dioj kaj homoj!”

²⁹ (1) volo (2) klopodo (3) menso (4) observo. Ili kune faras la bazon de potenco superanta tiun de ordinaraj homoj.

³⁰ Palie *māra*. Budhisma demono. “En budhismaj tekstoj, marao estas ofte priskribata kiel la persona diablo, kiel devao (dio) misuzanta sian potencon, sed oni povas ankaŭ rigardi lin kiel simbolon por onia propra emo tenti kaj trompi sin mem.” (Gunnar Gällmo)

La Bagavato ripetis la parolon ankoraŭ du fojojn. Sed Anando finfine ne komprenis la intencon de la Bagavato nek petis la Bagavaton plilongigi sian vivdaŭron.

La Bagavato diris al Anando, “Nun vi povas iri kaj fari laŭ via bontrovo.”

Anando stariĝis, riverencis la Bagavaton kaj ĉirkaŭiris lin dekstrume, kaj sidiĝis sub arbo proksima.

(38) Baldaŭ post kiam Anando foriris, marao proksimiĝis al la Bagavato, kaj diris al li jene:

“Majstro, bonvolu eniri en nirvanon. Ĝuste nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato.”

“La Bagavato iam antaŭe diris al mi, ‘Aĉulo, mi ne eniros en nirvanon tiom longe, kiom miaj disĉiplaj bikŝuoj ne atingos tian staton, ke ili sufiĉe kleriĝos, edifiĝos, gajnos memfidon, lernos multon, tenos la darmon, praktikos meditadojn laŭ la darmo, praktikos ĝuste, praktikos taŭge, lernos la instruon de sia gvidanto, anoncos ĝin, proklamos ĝin, montros ĝin, certigos ĝin, malfermos ĝin, dividos ĝin, klarigos ĝin, refutos eventualajn herezojn per rezonado, kaj predikos la darmon utilan al liberiĝo.’ Sed viaj disĉiploj jam atingis tian staton. Tial nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato.”

“La Bagavato diris ankaŭ la samon rilate al viaj disĉiplaj bikŝuinoj, al viaj disĉiplaj laikoj viraj kaj virinaj. Sed ili ĉiuj jam atingis tian staton. Tial nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato.”

“La Bagavato diris ankaŭ, ‘Aĉulo, mi ne eniros en nirvanon tiom longe, kiom ĉiuj miaj instruoj ne atingos tian staton, ke ili estos komprenitaj de multaj saĝuloj, prosperos, havos pli da influo, konatiĝos al pli da homoj, kaj tiamaniere disvastiĝos.’ Sed viaj instruoj jam atingis tian staton. Tial nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato.”

Kiam la marao ĉi tiel diris, la Bagavato respondis al li, “Aĉulo, ne zorgu pri tio. Baldaŭ la Tatagato eniros en nirvanon. La Tatagato eniros en nirvanon post tri monatoj.”

(39) En la sanktejo Ĉapala la Bagavato, tenante atentemon kaj klaran komprenon, rezignis sian kapablon plu vivi. Post tio okazis harhirtigaj tertremego kaj tondro.

La Bagavato komprenis la signifon de tiu ĉi fenomeno kaj formulis la jenan version:

Konsiderante kaj nirvanon kaj ekzistadon,
La sanktulo forlasis la karmon al ekzistado;

Interne plena de ĝojo kaj mensa trankvilo
Li rompis la kirason de sia propra kaŭzo de ekzistado.

(40) Tiam respektinda Anando ekhavis la jenan penson: “Ho, kiel mirinde, kiel rare! Kiel forta, giganta, harhirtiga estas la tertremego! Krome tondro! Kun kiaj kaŭzo-kondiĉoj³¹ okazis la tertremego?”

Anando proksimiĝis al la Bagavato kaj demandis lin pri sia miro.

(41) La Bagavato respondis al li:

“Troviĝas ok kaŭzo-kondiĉoj de tertremego. Kio estas ĉi tiuj ok?”

“Tiu ĉi tero estas subtenata de akvo; akvo estas subtenata de vento; vento estas subtenata de etero. Kiam ventego blovas, ĝi skuas akvon, kaj la skuiĝanta akvo tremigas la teron. Jen estas la unua kaŭzo-kondiĉo de tertremego.”

“Kiam ŝramano aŭ bramano posedanta superhoman kapablon kaj reganta libere sian menson, aŭ dio posedanta grandan superhoman kapablon kaj potencon, nur iomete praktikas meditado pri la tero kaj senfine praktikas meditado pri la akvo, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la dua kaŭzo-kondiĉo.”

“Kiam bodisatvo, malaperinte el la tuŝito³², kaj tenante atentemon kaj klaran komprenon, eniras en la uteron, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la tria kaŭzo-kondiĉo.”

“Kiam bodisatvo, tenante atentemon kaj klaran komprenon, eliras el la utero, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la kvara kaŭzo-kondiĉo.”

“Kiam Tatagato plenumas la plej superan vervekiĝon, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la kvina kaŭzo-kondiĉo.”

“Kiam Tatagato rulas la plej superan darmoradon³³, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la sesa kaŭzo-kondiĉo.”

³¹ En la komenco budhismo ne tre strikte distingis inter “kaŭzo” (sanskrite *hetu*) kaj “kondiĉo” (sanskrite *pratyaya*). Pli poste komentariistoj klarigis, ke kaŭzo estas interna aŭ rekta, dum kondiĉo estas ekstera aŭ malrekta, ofte uzante la ekzemplon de planto. Nome, kaŭzo de ĝia kresko estas semo, kaj kondiĉoj estas lumo, tero, akvo, k.t.p.

³² Laŭ budhisma kosmologio la tuta kosmo konsistas el la tri sferoj: sferoj de deziro, de materio, kaj de senmaterio. Kaj la unua sfero (de deziro) konsistas el la kvin subsferoj: narako, malsatulujo, bestujo, homa mondo, kaj dia mondo aŭ ĉielujo. La plej supera tavolo, nome dia mondo konsistas el la ses subtavoloj, el kiuj la kvara de malsupre estas nomata tuŝito. Tie, oni diras, bodisatvo restas kaj sin preparas kiel estonta budho.

³³ Rado havanta ok spokojn estas simbolo de darmo. “Ruli darmoradon” ofte signifas predikadon de Budho.

“Kiam Tatagato, tenante atentemon kaj klaran komprenon, rezignas sian kapablon plu vivi, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la sepa kaŭzo-kondiĉo.”

“Kiam Tatagato eniras en nirvanon sen resto³⁴, tiu ĉi tero skuiĝas kaj tremas. Jen estas la oka kaŭzo-kondiĉo.”

(42) “Anando, troviĝas ok specoj de kunveno. Kio estas ĉi tiuj ok? Kunveno de kŝatrioj, tiu de bramanoj, tiu de riĉuloj, tiu de ŝramanoj, tiu de kvar ĉielaj reĝoj³⁵, tiu de tridek tri dioj, tiu de maraoj, kaj tiu de brahmaoj³⁶.”

“Mi memoras, ke mi iam partoprenis en la kunveno de kŝatrioj, en kiu mi sidis, konversaciis kaj diskutis kun ili. En tiu okazo mia figuro similis al tiu de ili, mia voĉo similis al tiu de ili. Mi instrukciis ilin per darma parolo, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis ilin. Sed ili ne sciis, kiu mi estas, kaj demandis sin, ĉu mi estas dio aŭ homo.”

“Tiel same mi memoras, ke mi iam partoprenis en la kunveno de bramanoj, de riĉuloj, de ŝramanoj, de kvar ĉielaj reĝoj, de tridek tri dioj, de brahmaoj; en ĉiuj ĉi kunvenoj mi sidis, konversaciis kaj diskutis kun ili. En tiu okazo mia figuro similis al tiu de ili, mia voĉo similis al tiu de ili. Mi instrukciis ilin per darma parolo, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis ilin. Sed ili ne sciis, kiu mi estas, kaj demandis sin, ĉu mi estas dio aŭ homo.”

(43) “Anando, troviĝas ok kampoj de mensa regado. Kio estas ĉi tiuj ok?”

“Tuj perceptas sian internan formon kaj rigardas eksterajn diversajn formojn kiel limigitajn kaj kiel belajn aŭ malbelajn; tiuj konscias: ‘Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas’. Jen estas la unua kampo de mensa regado.”

“Tuj perceptas sian internan formon kaj rigardas eksterajn diversajn formojn kiel senlimajn kaj kiel belajn aŭ malbelajn; tiuj konscias: ‘Mi regas ilin en mia

³⁴ Laŭ la tradicia budhismo nirvano havas du aspektojn: nirvano kun resto kaj tiu sen resto. Ĉi tie resto signifas la staton, ke ĉe vervekiĝinto aŭ arahanto ankoraŭ restas deziroj nepre necesaj por daŭrigi la fizikan vivon. Tial nirvano sen resto estas preskaŭ sama kiel korpa morto.

³⁵ Diaj protektantoj de budhismo en la kvar direktoj. Ili loĝas en la plej malsupera tavolo el la ses diaj sferoj.

³⁶En hinduismo la eterna ĉefdio, kiu kreis la universon. Tiu ĉi dio estas personigo de hinduisma nocio pri absoluta principo nomata Brahmo. Budhismo ne ekskludis sed konservis tiun ĉi dion, tamen ne kiel absolutan aŭ ĉefan dion, sed kiel unu el la dioj gardantaj Budhon aŭ darmon. Cetere “Esperanto-Japana Vortaro” donas la vorton “Brahmo” por tiu ĉi dio. Sed ĝi duoble eraras, donante la vorton <Brahmo> anstataŭ <Brahmao> kaj <brahmano> anstataŭ <Brahmo>. Bonvolu vidi ankaŭ PIV.

menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la dua kampo de mensa regado."

"Tuj ne perceptas sian internan formon sed rigardas eksterajn diversajn formojn kiel limigitajn kaj kiel belajn aŭ malbelajn; tiuj konscias: 'Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la tria kampo de mensa regado."

"Tuj ne perceptas sian internan formon sed rigardas eksterajn diversajn formojn kiel senlimajn kaj kiel belajn aŭ malbelajn; tiuj konscias: 'Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la kvara kampo de mensa regado."

"Tuj ne perceptas sian internan formon sed rigardas eksterajn diversajn formojn kiel bluajn, bluaspektajn, blulumantajn; tiuj konscias: 'Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la kvina kampo de mensa regado."

"Tuj ne perceptas sian internan formon sed rigardas eksterajn diversajn formojn kiel flavajn, flavaspektajn, flavlumantajn; tiuj konscias: 'Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la sesa kampo de mensa regado."

"Tuj ne perceptas sian internan formon sed rigardas eksterajn diversajn formojn kiel ruĝajn, ruĝaspektajn, ruĝlumantajn; tiuj konscias: 'Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la sepa kampo de mensa regado."

"Tuj ne perceptas sian internan formon sed rigardas eksterajn diversajn formojn kiel blankajn, blankaspektajn, blanklumantajn; tiuj konscias: 'Mi regas ilin en mia menso kaj konas ilin tiel kiel ili estas'. Jen estas la oka kampo de mensa regado."

(44) "Anando, troviĝas ok liberiĝoj. Kio estas ĉi tiuj ok?"

"Tiu, kiuj havas formon, rigardas diversajn formojn. Jen estas la unua liberiĝo."

"Tiu, kiuj ne perceptas sian internan formon, rigardas eksterajn diversajn formojn. Jen estas la dua liberiĝo."

"Tuj bone komprenas, ke ĉio estas pura. Jen estas la tria liberiĝo."

"Tuj plene transcendas la percepton pri formo, estingas la percepton pro sensa reago, ne imagas diversajn perceptojn; pro tio ili restas en la mensa stato, en kiu oni konas senliman spacon. Jen estas la kvara liberiĝo."

“Tuj plene transcendas la mensan staton, en kiu oni konas senliman spacon, kaj restas en la mensa stato, en kiu oni konas senliman konscion. Jen estas la kvina liberiĝo.”

“Tuj plene transcendas la mensan staton, en kiu oni konas senliman konscion, kaj restas en la mensa stato, en kiu oni konas ne-ekziston. Jen estas la sesa liberiĝo.”

“Tuj plene transcendas la mensan staton, en kiu oni konas ne-ekzisto, kaj restas en la mensa stato, en kiu ideo ne ekzistas nek ne-ideo ekzistas. Jen estas la sepa liberiĝo.”

“Tuj plene transcendas la mensan staton, en kiu ideo ne ekzistas nek ne-ideo ekzistas, kaj atingas la estingiĝon de ĉia ideo kaj senso. Jen estas la oka liberiĝo.³⁷”

(45) “Nu, Anando, post kiam mi por la unua fojo vervekiĝis, mi restis sub la banjano³⁸, proskime de la rivero Neraĵaro en la vilaĝo Urvelo. Tiam marao proksimiĝis al mi kaj diris jene: ‘Majstro, nun la Bagavato bonvolu eniri en nirvanon. Ĝuste nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato.’”

“Mi respondis al li jene: ‘Aĉulo, mi ne eniros en nirvanon tiom longe, kiom miaj disĉiplaj bikŝuoj ne atingos tian staton, ke ili sufiĉe kleriĝos, edifiĝos, gajnos memfidon, lernos multon, tenos la darmon, praktikos meditadon laŭ la darmo, praktikos ĝuste, praktikos taŭge, lernos la instruon de sia gvidanto, anoncos ĝin, proklamos ĝin, montros ĝin, certigos ĝin, malfermos ĝin, dividos ĝin, klarigos ĝin, refutos eventualajn herezojn per rezonado, kaj predikos la darmon utilan al liberiĝo.’ Mi diris ankaŭ la samon rilate al miaj disĉiplaj bikŝuinoj, al miaj disĉiplaj laikoj viraj kaj virinaj.”

“Mi respondis al li fine: ‘Aĉulo, mi ne eniros en nirvanon tiom longe, kiom ĉiuj miaj instruoj ne atingos tian staton, ke ili estos komprenitaj de multaj saĝuloj, prosperos, havos pli da influo, konatiĝos al pli da homoj, kaj tiamaniere disvastiĝos.’”

(46) “Hodiaŭ, ĵus antaŭ momento, kiam mi restis en la sanktejo Ĉapala, la marao denove proksimiĝis al mi kaj diris, ‘Majstro, nun la Bagavato bonvolu eniri en nirvanon. Ĝuste nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato. Antaŭe la Bagavato diris, «Mi ne eniros en nirvanon tiom longe, kiom miaj disĉiploj ne atingos tian staton, ke ili sufiĉe kleriĝos, edifiĝos, gajnos

³⁷ Ĉi tie temas pri iom-post-ioma progreso de mensa liberiĝo, kaj la oka liberiĝo estas egala al nirvano kun resto.

³⁸ *Ficus benghalensis* (lat.) Simila al bodiarbo, sub kiu Ŝakjamunio vervekiĝis.

memfidon, lernos multon, tenos la darmon, praktikos meditado laŭ la darmo, praktikos ĝuste, praktikos taŭge, lernos la instruon de sia gvidanto, anoncos ĝin, proklamos ĝin, montros ĝin, certigos ĝin, malfermos ĝin, dividos ĝin, klarigos ĝin, refutos eventualajn herezojn per rezonado, kaj predikos la darmon utilan al liberiĝo. Mi ne eniros en nirvanon tiom longe, kiom ĉiuj miaj instruoj ne atingos tian staton, ke ili estos komprenitaj de multaj saĝuloj, prosperos, havos pli da influo, konatiĝos al pli da homoj, kaj tiamaniere disvastiĝos.» Tio, kion la Bagavato ĵuris, efektiviĝis. Tial nun la Bagavato bonvolu eniri en nirvanon. Ĝuste nun estas la tempo de ennirvaniĝo de la Bagavato.”

(47) “Responde al la marao mi diris: ‘Ne zorgu pri tio. Baldaŭ la Tatagato ennirvaniĝos. La Tatagato eniros en nirvanon post tri monatoj.’”

“Hodiaŭ, ĵus antaŭ momento, en la sanktejo Ĉapala la Tatagato, tenante atentemon kaj klaran komprenon, rezignis sian kapablon pluvivi.”

(48) Anando, aŭdinte tion, diris al la Bagavato: “Majstro, bonvolu resti en tiu ĉi mondo tiom longe, kiom la vivdaŭro de la Bagavato permesas, por la bonfarto kaj feliĉo de la homamaso, pro kompato al la mondo, por la utilo, bonfarto kaj feliĉo de dioj kaj homoj!”

“Sufiĉe, Anando! Ne petu la Tatagaton! Nun ne estas tempo peti la Tatagaton.”

Anando la duan fojon petis de la Bagavato la samon, sed lia peto ne estis akceptita.

Kiam li la trian fojon petis la samon, la Bagavato diris: “Ĉu vi fidas bodion de la Tatagato?”

“Jes, Majstro.”

“Kial do vi ĝenis la Tatagaton tri fojojn?”

“Mi iam rekte aŭskultis vin ĉi tiel: ‘Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.’”

“Ĉu vi fidas tion, kion la Tatagato diris?”

“Jes, Majstro.”

“Se tiel, tio estas via propra eraro; tio estas via propra miso. Kvankam la Tatagato klare aludis kaj sugestis sian intencon, vi ne komprenis tion, kaj sekve ne petis: ‘Majstro, bonvolu resti en tiu ĉi mondo tiom longe, kiom la

vivdaŭro de la Bagavato permesas, por la bonfarto kaj feliĉo de la homamaso, pro kompato al la mondo, por la utilo, bonfarto kaj feliĉo de dioj kaj homoj! Se vi estus petinta la Tatagaton, eĉ se du fojojn mi rifuzus vian peton, la trian fojon mi akceptus. Tial, Anando, tio estas via propra eraro; tio estas via propra miso.”

(49) “Iam mi restis sur la monto Vulturpinto proksima al Raĝagriho.”

“Ankaŭ tie mi diris al vi: ‘Raĝagriho estas loko plena de ĝojo. Vulturpinto estas loko plena de ĝojo. Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.’ Sed vi ne komprenis la intencon, kiun la Tatagato klare aludis kaj sugestis. Tio estas via propra eraro; via propra miso.”

(50) “Kiam mi restis sub la banjano, aŭ ĉe la krutaĵo Ĉora, aŭ ĉe la kavo Sattapanni sur la monto Vebhara, aŭ ĉe la roko Kala sur la monto Isigili, aŭ ĉe la kavo Sappasondika en la arbaro Sita, aŭ en la ĝardeno Tapoda, aŭ en la bambua ĝardeno Kalandaka-nivapa, aŭ en la mangarbaro de Ĵivaka, aŭ en la cerva parko Maddakutĉi - ili ĉiuj estas proksimaj al Raĝagriho -, mi diris al vi: ‘Ĉi tiuj lokoj estas plenaj de ĝojo. Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.’ Sed vi ne komprenis la intencon, kiun la Tatagato klare aludis kaj sugestis. Tio estas via propra eraro; via propra miso.”

(51) “Iam mi restis en la sanktejo Udena proksima al Vajŝalio.”

“Ankaŭ tie mi diris al vi: ‘Vajŝalio estas loko plena de ĝojo. Udeno estas loko plena de ĝojo. Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.’ Sed vi ne komprenis la intencon, kiun la Tatagato klare aludis kaj sugestis. Tio estas via propra eraro; via propra miso.”

(52) “Kiam mi restis en la sanktejo Gotamaka, aŭ en la sanktejo Sattamba, aŭ en la sanktejo Bahuputta, aŭ en la sanktejo Saradanda - ili ĉiuj estas proksimaj

al Raĝagriho -, mi diris al vi: 'Ĉi tiuj lokoj estas plenaj de ĝojo. Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.' Sed vi ne komprenis la intencon, kiun la Tatagato klare aludis kaj sugestis. Tio estas via propra eraro; via propra miso."

"Hodiaŭ mi diris al vi: 'Vajŝalio estas loko plena de ĝojo. Ankaŭ plenaj de ĝojo estas la sanktejoj Udena, Gotamoka, Sattamba, Bahuputta, Sarandada kaj Ĉapala. Ĉiuj, kiuj evoluigas la kvar bazojn de spirita potenco, praktikas ilin, stiras ilin, fortigas ilin, konservas ilin, ekzamenas ilin kaj perfektigas ilin, povas, se ili volas, plilongigi sian vivdaŭron. La Tatagato posedas tiujn ĉi bazojn, kaj tial povas plilongigi sian vivdaŭron laŭ sia volo.'"

"Kvankam la Tatagato klare aludis kaj sugestis sian intencon, vi ne komprenis tion, kaj sekve ne petis: 'Majstro, bonvolu resti en tiu ĉi mondo tiom longe, kiom la vivdaŭro de la Bagavato permesas, por la bonfarto kaj feliĉo de la homamaso, pro kompato al la mondo, por la utilo, bonfarto kaj feliĉo de dioj kaj homoj!' Se vi estus petinta la Tatagaton, eĉ se du fojojn mi rifuzus vian peton, la trian fojon mi akceptus. Tial, Anando, tio estas via propra eraro; tio estas via propra miso."

(53) "Anando, ĝis nun mi predikadis, ke ĉiuj, kiuj estas karaj kaj amataj, aliiĝas per naskiĝo aŭ per morto, kaj ke ni disiĝas inter ni postmorte, ĉu ne? Ne eblas, ke naskitaĵoj aŭ formitaĵoj aŭ faritaĵoj, kiuj estas pereontaj, ne pereu. Ili estis forĵetitaj, sputitaj, ellasitaj, tranĉitaj, kaj rezignitaj de Tatagato; ankaŭ la kapablo vivi estis forĵetita." Mi jam diris: 'Baldaŭ la Tatagato ennirvaniĝos. La Tatagato eniros en nirvanon post tri monatoj.' Ne povas esti, ke la Tatagato nuligas sian jam diritan vorton, por ke la Tatagato pli longigu sian vivon."

"Venu, Anando, ni iru al la halo en Granda Arbaro."

"Jes, Majstro."

Kaj la Bagavato iris al halo en Granda Arbaro kaj diris al Anando: "Iru nun, Anando, alvoki ĉiujn bikŝuojn loĝantajn en kaj ĉirkaŭ Vajŝalio, ke ili kunvenu al la aŭditorio."

"Jes, Majstro."

Post kiam ĉiuj bikŝuoj kunvenis, li proksimiĝis al la Bagavato, riverencis, kaj ekstaris flanke de la Bagavato. Kaj li diris, "La samgo de bikŝuoj estas kunveninta. Bonvolu veni al la aŭditorio laŭ via bontrovo."

(54) La Bagavato iris al la aŭditorio, sidiĝis sur sian destinitan lokon, kaj alparolis la bikŝuojn ĉi tiel:

“Vi bikŝuoj, mi ekkonis kaj predikadis diversajn darmojn. Vi devas ilin bone lerni kaj praktiki, por ke la puraj agoj de la darmoj daŭru longan tempon kaj utilu al la intereso de multaj homoj, al la feliĉo de multaj homoj, al la prospero, intereso kaj feliĉo de dioj kaj homoj, pro kompato al la mondo. Kion do signifas la darmoj, kiujn mi ekkonis kaj predikadis?”

“Ili estas: la kvar specoj de meditado³⁹, la kvar klopodoj⁴⁰, la kvar bazoj de spirita potenco⁴¹, la kvin kapabloj⁴², la kvin fortoj⁴³, la sep faktoroj de vervekiĝo⁴⁴, kaj la okera nobla vojo⁴⁵. Tiuj ĉi estas la darmoj, kiujn mi ekkonis kaj predikadis. Vi devas ilin bone lerni kaj praktiki, por ke la puraj agoj de la darmoj daŭru longan tempon kaj utilu al la intereso de multaj homoj, al la feliĉo de multaj homoj, al la prospero, intereso kaj feliĉo de dioj kaj homoj, pro kompato al la mondo.

(55) La Bagavato alparolis la bikŝuojn:

“Nun mi diras al vi: «Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj. Vi devas peni kun diligenteco.» Baldaŭ la Tatagato enirvaniĝos. Post tri monatoj la Tatagato intencas enirvaniĝi.”

Tiel estis la vortoj de la Bagavato. Kaj la Majstro aldone diris:

“Mia aĝo jam maturiĝis;
Mia vivo ne longe daŭros.
Mi lasos vin kaj iros sola;
Mi faris min mia rifuĝejo.
Vi bikŝuoj, ne estu maldiligentaj.
Kun atentemo bone tenu ŝilojn.
Bonordigu vian menson, bone pensu.
Gardu vian menson.
Kiu diligente tenas
Darmon kaj disciplinon,

³⁹ vd. la piednoton de la 16a paragrafo.

⁴⁰ Klopodi haltigi estiĝintan malbonon, klopodi ne estigi ankoraŭ ne estiĝintan malbonon, klopodi estigi ankoraŭ ne estiĝintan bonon, klopodi grandigi estiĝintan bonon.

⁴¹ vd. la piednoton de la 37a paragrafo.

⁴² Fido, klopodo, atentemo, koncentro, saĝo

⁴³ Samaj kiel la kvin kapabloj.

⁴⁴ vd. la 9an paragrafon.

⁴⁵ La ok eroj de nobla vojo: ĝusta vido, ĝusta penso, ĝusta parolo, ĝusta ago, ĝusta vivteno, ĝusta klopodo, ĝusta atentemo, ĝusta koncentro.

Tiu forĵetas sansaron;
Dukho ĉi tie ĉesas.”

[4. La Lasta Manĝo]

(56) Antaŭtagmeze la Bagavato, prenante robon kaj bovlon kun si, iris al Vajŝalio por almozpeti. Post la tagmanĝo el bovlo la Bagavato rigardis Vajŝalion, turnante sian tutan korpon, kaj alparolis Anandon:

“Anando, tio ĉi estas la lasta okazo por la Tatagato rigardi Vajŝalion. Venu, Anando, ni iru al la vilaĝo Bhando.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Bhando kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon kaj alparolis la bikŝuojn:

“Ĉar ni, vi kaj mi, ĝis nun ne komprenis nek klarvidis la kvar darmojn, ni dum longa tempo ripetadis sansaron. Kio estas la kvar?”

“Ĉar ni, vi kaj mi, ĝis nun ne komprenis nek klarvidis noblajn ŝilojn[1], noblan koncentron[2], noblan saĝon[3] kaj noblan liberiĝon[4], ni dum longa tempo ripetadis sansaron.”

“Sed nun, noblaj ŝiloj, nobla koncentro, nobla saĝo kaj nobla liberiĝo estas komprenitaj kaj klarviditaj. Avido al ekzisto estas fortranĉita; ligilo al ekzisto estas elĉerpita. Ĉe ni ne okazos renaskiĝo.”

La Bagavato tiel diris kaj aldonis jene:

“Ŝilo, koncentro, saĝo,
Kaj liberiĝo estas la plej superaj;
Gotamo, la honorinda,
Komprenis tiujn ĉi darmojn.
La Budho bone komreninte ilin,
Predikis ilin al bikŝuoj.
La Majstro okulohavanta nirvaniĝis
Kaj atingis la ĉeson de dukho.”

La Bagavato plurfoje faris la jenan predikon, dum li restis en la vilaĝo Bhando:

“Ŝilo estas ĉi tia.”

“Koncentro estas ĉi tia.”

“Saĝo estas ĉi tia.”

“Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meriton.”

“Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meriton.”

“Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido.”

(57) Post kiam la Bagavato restis en la vilaĝo Bhandā tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al vilaĝoj Hatthi, Amba, Ĵambu kaj Bhoga.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Bhoga kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon en la sanktejo Anando proksima al Bhoga.

La Bagavato alparolis la bikŝuojn:

“Nun mi klarigu al vi la kvar gravajn instruojn. Bone aŭskultu min kaj pripensu ilin.”

“Jes, Majstro.”

La Bagavato diris jene:

(58) “Vi bikŝuoj, supozu, ke iu bikŝuo diras jene: ‘Amiko mia, al mi la Bagavato rekte instruis: «Tio estas la darmo; tio estas la vinajo⁴⁶; tio estas la sasanao⁴⁷.»’ Tiu ĉi parolo de la bikŝuo ne estas ĝojinda nek riproĉinda. Ne ĝoju, nek riproĉu, sed bone ekzameni la frazojn kaj komparu ilin kun la sutro⁴⁸ kaj la vinajo. Se ili ne konkordas kun la sutro nek kun la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili ne devenis de la vortoj de la Bagavato; la bikŝuo erare komprenis la instruon.» En tiu kazo lia parolo devas esti forĵetita. Sed se ili konkordas kun la sutro kaj la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili devenis de la vortoj de la Bagavato; la bikŝuo ĝuste komprenis la instruon.» Jen tio ĉi estas la unua grava instruo. Vi bone memoru ĝin.”

⁴⁶ Palie *vinaya*. Kolekto de reguloj de konduto por bikŝuoj kaj bikŝuinoj aŭ por samgo. Dum ŝilo estas propravola moralo, vinajo estas deviga al ĉiuj bikŝuoj kaj bikŝuinoj. Kiam bikŝuo/bikŝuino rompas regulojn de vinajo, ili estas punitaj, eĉ eterne forpelitaj el samgo en la plej grava okazo.

⁴⁷ Palie *sāsana*. Mesaĝo aŭ instruo de la Budho aŭ budhismo lingve esprimita. La vero aŭ la darmo estas super lingva esprimo, tial oni povas diri, ke sasanao estas relativa sed darmo estas absoluta. (Ŝakjamunio mem antaŭdiris, ke sasanao ne daŭras eterna.)

⁴⁸ Palie *sutta* kaj sanskrite *sūtra*. Ĝia originala signifo estis “ŝnureto”. En la praa budhismo tiu ĉi vorto estis uzata en la senco “ŝnureto por fiksi kolektitajn orajn vortojn de Ŝakjamunio”. Hodiaŭ oni komprenas “sutron” kiel tekston de budhisma instruo, kiu havas diversajn branĉojn aŭ skolojn, pro kio troviĝas multegaj sutroj. Ĉi tie tamen simple temas pri instruo.

“Vi bikŝuoj, supozu, ke iu bikŝuo diras jene: ‘Al mi la samgo kun patriarko, kiu troviĝas en tiu aŭ tiu loko, rekte instruis: «Tio estas la darmo; tio estas la vinajo; tio estas la sasanao.»’ Tiu ĉi parolo de la bikŝuo ne estas ĝojinda nek riproĉinda. Ne ĝoju, nek riproĉu, sed bone ekzameni la frazojn kaj komparu ilin kun la sutro kaj la vinajo. Se ili ne konkordas kun la sutro nek kun la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili ne devenis de la vortoj de la Bagavato; la samgo erare komprenis la instruon.» En tiu kazo lia parolo devas esti forĵetita. Sed se ili konkordas kun la sutro kaj la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili devenis de la vortoj de la Bagavato; la samgo ĝuste komprenis la instruon.» Jen tio ĉi estas la dua grava instruo. Vi bone memoru ĝin.”

“Vi bikŝuoj, supozu, ke iu bikŝuo diras jene: ‘Al mi multaj patriarkaj bikŝuoj, kiuj estas erudiciaj, profunde konas la sutron, firme tenas la darmon kaj la vinajon kaj la liston de reguloj, kaj kiuj loĝas en tiu aŭ tiu loko, rekte instruis: «Tio estas la darmo; tio estas la vinajo; tio estas la sasanao.»’ Tiu ĉi parolo de la bikŝuo ne estas ĝojinda nek riproĉinda. Ne ĝoju, nek riproĉu, sed bone ekzameni la frazojn kaj komparu ilin kun la sutro kaj la vinajo. Se ili ne konkordas kun la sutro nek kun la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili ne devenis de la vortoj de la Bagavato; la patriarkoj erare komprenis la instruon.» En tiu kazo lia parolo devas esti forĵetita. Sed se ili konkordas kun la sutro kaj la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili devenis de la vortoj de la Bagavato; la patriarkoj ĝuste komprenis la instruon.» Jen tio ĉi estas la tria grava instruo. Vi bone memoru ĝin.”

“Vi bikŝuoj, supozu, ke iu bikŝuo diras jene: ‘Al mi unu patriarka bikŝuo, kiu estas erudicia, profunde konas la sutrojn, firme tenas la darmon kaj la vinajon kaj la liston de reguloj, kaj kiu loĝas en tiu aŭ tiu loko, rekte instruis: «Tio estas la darmo; tio estas la vinajo; tio estas la sasanao.»’ Tiu ĉi parolo de la bikŝuo ne estas ĝojinda nek riproĉinda. Ne ĝoju, nek riproĉu, sed bone ekzameni la frazojn kaj komparu ilin kun la sutro kaj la vinajo. Se ili ne konkordas kun la sutro nek kun la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili ne devenis de la vortoj de la Bagavato; la patriarko erare komprenis la instruon.» En tiu kazo lia parolo devas esti forĵetita. Sed se ili konkordas kun la sutro kaj la vinajo, oni devas konkludi: «Certe ili devenis de la vortoj de la Bagavato; la patriarko ĝuste komprenis la instruon.» Jen tio ĉi estas la kvara grava instruo. Vi bone memoru ĝin.”

“Tiu ĉi estas la kvar gravaj instruoj. Vi bone memoru ilin.”

Tiel, la Bagavato plurfoje faris la jenan predikon, dum li restis en la sanktejo Anando proksima al la urbo Bhoga:

“Ŝilo estas ĉi tia.”

“Koncentro estas ĉi tia.”

“Saĝo estas ĉi tia.”

“Koncentro sur plenumita ŝilaro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Saĝo sur plenumita koncentro alportas grandan rekompencan kaj meritan.”

“Menso sur plenumita saĝo ebligas liberiĝon el diversaj kleŝoj, nome kleŝoj pri avido, pri ekzisto kaj pri malvido.”

(59) Post kiam la Bagavato restis en Bhoga tiel longe kiel li volis, li alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al Pavo.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al Pavo, kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato prenis sian loĝejon en la mangarba ĝardeno posedata de Ĉunda, forĝisto, proksima al Pavo.

Tiam Ĉunda aŭdis, ke la Bagavato nun restas en lia mangarba ĝardeno. Li proksimiĝis al la Bagavato. Post riverenco li sidiĝis flanke de la Bagavato, kiu per sia prediko instruis, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis lin.

Li diris al la Bagavato, “Majstro, bonvolu akcepti nian inviton por manĝado morĝaŭa, kune kun la samganoj.”

La Bagavato konsentis la peton per silento. Ĉunda stariĝis, riverencis la Bagavaton, ĉirkaŭiris lin dekstrume, kaj foriris.

En la sekva frumateno Ĉunda ordonis siajn subulojn prepari la plej bonajn manĝaĵojn molajn kaj durajn inkluzive de porkaĵo⁴⁹ kaj anonci, “Majstro Gotamo, estas la tempo. Manĝaĵoj estas pretaj.”

Antaŭtagmeze la Bagavato, vestinte sin per roboj kaj preninte bovlon, vizitis lian loĝejon. Kaj la Bagavato sidiĝis sur la loko preparita por li. Sidiĝinte, la Bagavato alparolis Ĉundan:

“Ĉunda, donu al mi la pladon de porkaĵo, kiun vi preparis. Aliajn manĝaĵojn durajn kaj molajn de vi preparitajn donu al aliaj bikŝuoj.”

“Jes, Majstro.”

⁴⁹ Palie *sūkara-maddava*. Tiu ĉi vorto laŭlitere signifas “molan porkon”. Sed la kompreno, ke tiu ĉi plado temas pri porka viando, ne plaĉis al plipostaj, precipe mahajanaj, budhanoj, kiuj emas supozi, ke Ŝakjamunio estis vegetarano. Multaj asertis, ke *sūkara-maddava* signifas “ŝatatan de porko”, t.e. fungon. Mi ne povas klare diri, ĉu tiu estas porkaĵo aŭ fungo. Sed oni devas scii, ke bikŝuoj en Hindio ne rifuzis manĝi viandon, ĉar ili devis akcepti ĉian ajn manĝaĵon oferitan de laikoj, esceptante tian viandon de vivaĵo, pri kiu bikŝuo scias, ke oni mortigis sole por oferi al bikŝuoj.

Ĉunda faris tiel, kiel la Bagavato diris. Kaj la Bagavato diris al Ĉunda:

“Enterigu la restaĵon de la porkaĵo. En tiu ĉi mondo inkludanta diojn, maraĵojn kaj brahmaĵojn, kaj en la anaro inkludanta ŝramanojn kaj bramanojn, diojn kaj homojn, neniu krom la Tatagato povas plene digesti ĝin.”

“Jes, Majstro.”

Post kiam li enterigis la restaĵon de la porkaĵo, li alproksimiĝis al la Bagavato. Post riverenco li sidiĝis flanke de la Bagavato, kiu per sia prediko instruis, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis lin. Poste la Bagavato ekstaris kaj foriris.

(60) La Bagavato, kiu prenis la manĝaĵon oferitan de Ĉunda, enfalis en gravan malsanon morte dolorigan kun sangado. Sed la Bagavato, tenante atentemon kaj klaran komprenon, sen embaraso eltenis ĝin.

La Bagavato alparolis Anandon, “Venu, Anando, ni iru al Kuŝinagaro.”

“Jes, Majstro.”

Mi aŭdis:

Preninte la manĝaĵon de la forĝisto Ĉunda,

La Saĝulo enfalis en gravan malsanon

Morte dolorigan.

La Majstro, kiu manĝis la pladon de porkaĵo,

Estis atakita de akra doloro;

Havante lakson, la Bagavato diris,

“Mi iros al la urbo Kuŝinagaro.”⁵⁰

(61) La Bagavato survoje deflankiĝis de la vojo kaj alproksimiĝis al iu arbo. Tie la Bagavato diris al Anando:

“Por mi bonvolu faldi mian robon kvaroble kaj sterni ĝin. Mi estas laca. Mi volas sidi.”

“Jes, Majstro.”

La Bagavato sidiĝis sur la tiel faritan sidlokon kaj diris al Anando:

“Por mi bonvolu alporti akvon. Mi estas soifa. Mi volas trinki akvon.”

Anando respondis al la Bagavato: “Majstro, ĵus nun kvincent ĉaroj pasis ĉirkaŭ ĉi tie. Tial iliaj radoj malmultigis, malordigis kaj malklarigis la akvon. Sed ne malproksime de ĉi tie fluas la rivero Kakudha kun pura, plaĉa,

⁵⁰ Tiu ĉi versaĵo estis enmetita okaze de la unua koncilio por redakti la sutron tuj post la forpaso de Ŝakjamunio. Eble ĉi tie “Mi” indikas ne Anandon, kiu estis la servisto de Ŝakjamunio, sed iun alian bikŝuon.

malvarmeta kaj klara akvo kaj kun belega kaj ĝojiga vadejo. Tie la Majstro povos trinki akvon kaj refreŝigi la korpon.

Sed la Bagavato ripetis duafoje kaj triafoje sian peton. Anando respondis, “Jes, Majstro.” Kaj li kunportante bovlon alproksimiĝis al la rivereto najbara.

La rivereto estis dispremita de la radoj, kaj la akvo estis malmultigita, malordigita kaj malklarigita. Sed kiam Anando alproksimiĝis, la akvo ekfluis purigita kaj klara. Anando diris al si: «Ho, kiel mirinda, kiel rara estas la granda forto, la majesta forto de la Tatagato! La malpuritiga akvo de la rivereto ekfluis purigita kaj klara, kiam mi alproksimiĝis.»

Anando portis la akvon per la bovlo kaj revenis al la sidloko de la Bagavato. Li diris: “Majstro, mirinda kaj rara estas la granda forto, la majesta forto de la Tatagato. La malpuritiga akvo de la rivereto ekfluis purigita kaj klara, kiam mi alproksimiĝis. Bonvolu trinki la akvon.”

La Bagavato trinkis la akvon.

(62) Ĝuste tiam Pukkusa, kiu estis estro de la regno Mallo⁵¹ kaj iam estis disĉiplo de Alara-Kalama⁵², paŝadis sur la longa vojo de Kuŝinagaro al Pavo.

Pukkusa vidis la Bagavaton sidanta sub unu arbo. Kaj li proksimiĝis al la sidloko de la Bagavato, riverencis, kaj eksidis flanke de la Bagavato. Li diris al la Bagavato:

“Majstro, estas mirinde kaj rare. La ŝramanoj⁵³ restas trankvilaj. Iam antaŭe, Alara-Kalama post longa paŝado deflankiĝis de vojo kaj sidiĝis sub arbo por eviti tagan varmegon. Tiam kvincent ĉaroj sinsekve pasis proksime de li. Iu viro, kiu sekvis la karavanon, venis kaj diris al li:

‘Majstro, ĉu vi vidis la kvincent ĉarojn pasi?’

‘Ne, mi ne vidis.’

‘Ĉu vi aŭdis ilian bruon?’

‘Ne, mi ne aŭdis.’

‘Ĉu vi estis dormanta?’

‘Ne, mi ne estis dormanta.’

‘Ĉu vi havis konscion?’

⁵¹ Unu el la dek ses potencaj regnoj en la tempo de Ŝakjamunio. Ĝiaj ĉefaj urboj estis Pavo kaj Kuŝinagaro.

⁵² Iama gvidanto de Ŝakjamunio. Li instruis manieron de meditado.

⁵³ Palie *samaṇa*. Religiaj praktikantoj en antikva Hindio ekster la tradicio de bramanismo. Bikŝuoj ankaŭ estas ŝramanoj. Sed oni povas uzi la vorton “ŝramano” por indiki praktikantojn ne-budhanajn. Tial la traduko de “ŝramano” en Esperanto-Japana Vortaro (Japana Esperanto-Instituto) “*仏教修行者*” estas erara. PIV donas pli ekzaktan klarigon.

'Jes.'

'Majstro, vi havis konscion, estis maldorma, kaj tamen ne vidis kvincent ĉarojn pasantaj proksime, nek aŭdis ilian bruon. Kaj via robo estas kovrita de polvo...'

'Vi pravas.'

La viro tiam diris al si: «Ho, kiel mirinde! Ho, kiel rare! Kiel la ŝramanoj restas trankvilaj! Kvankam ili havis konscion kaj estas maldormaj, ili ne vidis la kvincent ĉarojn sinsekve preterpasantaj, nek aŭdis ilian bruon.» Li konfesis plenan fidon al Alara-Kalama kaj foriris."

(63) La Bagavato diris: "Supozu la jenajn du okazojn, Pukkusa. La unua kazo: havante konscion kaj estante maldorma, ne vidi kvincent ĉarojn sinsekve preterpasantaj, nek aŭdi ilian bruon. La dua kazo: havante konscion kaj estante maldorma, ne vidi nek aŭdi, ke pluvegas, tondras, fulmas kaj la fulmo falis. Kiel vi pensas? Kiu el la du okazoj estas pli malfacile plenumeba kaj atingebla?"

"Ĉu kvincent, ĉu sescent, ĉu sepcent, ĉu okcent, ĉu naŭcent, ĉu mil ĉaroj, ili tute ne gravas. Estas pli malfacile plenumeba kaj atingebla ne vidi nek aŭdi, ke pluvegas, tondras, fulmas kaj la fulmo falis, havante konscion kaj estante maldorma."

"Mi iam restis en dometo el pajlo proksima al Atuma. Tiam pluvegis, tondris, fulmis kaj la fulmo falis; pro tio du farmistaj fratoj kaj kvar bovoj mortis. Amaso da homoj el Atuma aliris tien, kie ili mortis. Ĝuste tiam mi eliris kaj promenadis ĉirkaŭ la loko. Unu viro el la amaso venis al mi, riverencis min kaj ekstaris flanke de mi. Mi diris al li:

'Kial tiu amaso da homoj venis ĉi tien?'

'Ĝus pluvegis, tondris, fulmis kaj la fulmo falis; pro tio du farmistaj fratoj kaj kvar bovoj mortis. Tial ni estas ĉi tie. Sed Majstro, kie vi estis?'

'Mi estis ĉi tie.'

'Ĉu vi vidis la scenon?'

'Ne, mi ne vidis.'

'Ĉu vi aŭdis la sonon?'

'Ne, mi ne aŭdis.'

'Ĉu vi estis dormanta?'

'Ne, mi ne estis dormanta.'

'Ĉu vi havis konscion?'

'Jes.'

‘Majstro, vi havis konscion, estis maldorma, kaj tamen ne vidis nek aŭdis, kiam pluvegis, tondris, fulmis kaj la fulmo falis...’

‘Vi pravas.’

La viro tiam diris al si: «Ho, kiel mirinde! Ho, kiel rare! Kiel la ŝramanoj restas trankvilaj! Kvankam ili havis konscion kaj estas maldormaj, ili ne vidis nek aŭdis, kiam pluvegis, tondris, fulmis kaj la fulmo falis.» Li konfesis plenan fidon al mi, riverencis min, ĉirkaŭiris min dekstrume kaj foriris.

Aŭdinte tion ĉi, Pukkusa diris al la Bagavato jene:

“Majstro, mi havis fidon al Alara-Kalama. Sed mi lasu ĝin al ventego aŭ forĵetu en torenton. Majstro, estas mirinde! Estas mirindege! Kvazaŭ oni helpus iun faliĝintan restariĝi, aŭ malkovrus ion kovritan, aŭ montrus ĝustan vojon al vojperdinto, aŭ levus torĉon en mallumo pensante «Okulhavantoj vidas diversajn aĵojn.», tiel, ho Majstro, vi bonvolis klarigi la darmon per multaj manieroj. Nun mi rifuĝas al la Bagavato, al la darmo kaj al la samgo. Bonvolu akcepti min kiel dumvivan upasakon.”

(64) Pukkusa diris al viro: “Alportu al mi la du specialajn orkolorajn robojn.” Kaj li alportis ilin al Pukkusa.

Pukkusa proponis ilin al la Bagavato, dirante: “Tio ĉi estas la du specialaj orkoloraj roboj. Bonvolu akcepti ilin pro via kompatato al mi.”

“Do, donacu al mi unu, kaj la alian donacu al Anando.”

“Jes, Majstro.”

La Bagavato per sia prediko instruis, admonis, kuraĝigis kaj ĝojigis Pukkusan. Poste ĉi tiu stariĝis, riverencis la Bagavaton, ĉirkaŭiris lin dekstrume kaj foriris.

(65) Baldaŭ post la foriro de Pukkusa, Anando vestis la Bagavaton per la speciala robo. La robo, kiun la Bagavato surmetis, ŝajnis perdinta sian brilon. Anando diris al la Bagavato: “Estas mirinde, estas rare, ke la haŭto de la Tatagato estas tiel pura kaj blanka. Tiu ĉi orkolora speciala robo, kiun la Bagavato surmetis, ŝajnas perdinta sian brilon.”

“Estas tiel, kiel vi diris. Interalie en du okazoj la Tatagato ekhavas puran korpon kaj blankan haŭton. Kiaj estas la du okazoj?”

“La unua estas la nokto, en kiu la Tatagato plenumas la plej superan vervekiĝon; la dua estas la nokto, en kiu la Tatagato eniras en nirvanon sen

resto. En tiu ĉi profunda nokto okazos la enirvaniĝo de la Tatagato inter la ĝemelaj salaoj⁵⁴ en Kuŝinagaro. Venu, Anando, ni iru al la rivero Kakudha.”

“Jes, Majstro.”

Paro de orkolora robo
Oferita de Pukkusa;
La Majstro surmetis ĝin,
Brilis orkolore.

(66) La Bagavato alproksimiĝis al la rivero Kakudha kun la granda samgo, kaj tie banis sin, trinkis la akvon kaj sensoifigis sin. Poste la Bagavato stariĝis kaj alproksimiĝis al mangarbo, kaj tie diris al respektinda Ĉundaka:

“Por mi bonvolu faldi mian robon kvaroble kaj sterni ĝin. Mi estas laca. Mi volas kuŝiĝi.”

“Jes, Majstro.”

Ĉundaka faris tiel, kaj la Bagavato, tenante atentemon kaj klaran komprenon, kuŝiĝis sur sia dekstra flanko, en la leona pozo, apogante unu piedon sur la alia por prepari sin por sia refoja stariĝo. Ĉundaka sidiĝis antaŭ la Bagavato.

Al la rivero la Bagavato iris;
Tie la akvo klara, pura kaj komforta.
La Tatagato, la Majstro, nekomparebla,
Eniris en ĝin, kun sia korpo laciĝinta.
La Majstro respektata inter bikŝuoj
Banis sin, trinkis la akvon kaj elakviĝis.
La Bagavato predikanta la darmon ĉi-monde
Atingis mangarbon.
“Kvaroble faldu la robon, mi volas kuŝiĝi.”
Tiel la Bagavato al Ĉundaka.
Petite de la Bagavato Ĉundaka
Tuj sternis la robon kvaroble falditan.
La Majstro kuŝiĝis kun sia korpo laciĝinta.
Ĉundaka sidiĝis antaŭ la Majstro.

(67) La Bagavato diris al Anando:

⁵⁴ Palie *sāla* kaj sanskrite *śāla*. Scienca nomo estas Fortika ŝoreo (*Shorea robusta*). Vortaro Japano-Esperanta (Japano Esperanto-Instituto) donas la tradukan vorton “saluo”. Probable tiu ĉi estas erare enkondukita el la sanskrita *śāla*. Esperanta traduko de “Malsata Ŝtono” de Tagore uzas “salarbo”-n. Sed “sal-” havas la alian signifon.

“Povas esti, ke iu igos Ĉundan penti, dirante al li, ‘La Tatagato, manĝinte la manĝaĵon oferitan de vi, eniris en nirvanon. Tial vi ne povos gajni meriton.’ Lia pento devas esti forigita per la deklaro: ‘La Tatagato, manĝinte la manĝaĵon oferitan de vi, eniris en nirvanon. Tial vi povos gajni meriton. Mi aŭdis tion ĉi rekte de la Bagavato. Jenaj du specoj de manĝofero havas tutegalan rekompencan kaj tutegalan rezulton, pli grandan rekompencan kaj pli grandan meriton ol alispeca manĝofero. Kio estas la du? La manĝofero, kun kiu la Tatagato plenumas la plej superan vervekiĝon, kaj la manĝofero, kun kiu la Tatagato eniras en nirvanon sen resto. Ĉunda akumulas siajn karmojn⁵⁵, kiuj alportos al li longan vivon, bonan aspekton, komforton, bonan famon, renaskiĝon en dia mondo kaj regpovon.’ La pento de Ĉunda devas esti forigita per tiu ĉi deklaro.”

La Bagavato, konante la signifon de la manĝofero de Ĉunda, versis jene:

Al oferanto multiĝas merito.

Al sinreganto ne estiĝas venĝemo.

Al bona homo, kiu forĵetis malbonon

Kaj fortranĉis avidemon, koleron kaj malsaĝon,

Estiĝas plena trankvilo.

[5. en Kuŝinagaro]

(68) La Bagavato diris al Anando:

“Venu, Anando, ni transiru la bordon de la rivero Hiranjavati, kaj plu iru al la salaa arbaro en Kuŝinagaro, la urbo de la regno Mallo.”

“Jes, Majstro.”

Kaj la Bagavato iris al la salaa arbaro kune kun la granda samgo. Tie la Bagavato diris al Anando:

“Por mi bonvolu aranĝi liton inter la ĝemelaj salaoj kun la kapo al la nordo. Mi estas laca. Mi volas kuŝiĝi.”

“Jes, Majstro.”

Anando faris tiel, kaj la Bagavato, tenante atentemon kaj klaran komprenon, kuŝiĝis sur sia dekstra flanko, en la leona pozo, apogante unu piedon sur la alia.

Ĝuste tiam la ĝemelaj salaoj plene floris, kvankam tiam ne estis la sezono de florado. La florpetaĵoj defalis kaj pluvis sur la korpon de la Tatagato por

⁵⁵ Ago naskanta/-onta postan influon al la aganto mem aŭ al lia/ŝia ekstero.

respekti la Tatagaton. Ankaŭ la florpetaloj de la ĉiela mandaravo⁵⁶ kaj la pulvoroj de la ĉiela santalo defalis kaj pluvis sur la korpon de la Tatagato por respekti la Tatagaton. En la ĉielo ĉielaj muzikiloj estis ludataj kaj ĉiela ĥoro estis kantata por respekti la Tatagaton.

(69) La Bagavato diris al Anando:

“La florpetaloj de la salaĵoj kaj de la mandaravo, kaj la pulvoroj de la santalo defalis kaj pluvis sur la korpon de la Tatagato, respektante la Tatagaton. Ankaŭ ĉielaj muzikiloj kaj ĉiela ĥoro respektas la Tatagaton.”

“Sed sciu, ne nur per tio ĉi la Tatagato estas respektata, honorata, amata, regalata aŭ adorata. Ĉu bikŝuoj aŭ bikŝuinoj, ĉu upasakoj aŭ upasakinoj, ili, sekvante la darmon, vivante ĝuste en la darmo, irante laŭ la vojo de la darmo, vere respektas, honoras, amas, regalias kaj adoras la Tatagaton en la plej alta grado. Tial vi ĉiuj devas trejni vin kun la decido en si: «Ni sekvu la darmon, vivu ĝuste en la darmo, iru laŭ la vojo de la darmo.»”

(70) Ĝuste tiam respektinda Upavana ventumis la Bagavaton, starante antaŭ li. La Bagavato postulis de li flankiĝon, dirante:

“Vi ne estu tie. Ne staru antaŭ mi.”

Tiam Anando diris al si: “Upavana servadis al la Bagavato dum longa tempo. Kial la Bagavato postulis lian flankiĝon?” Anando demandis la Bagavaton pri la kialo.

La Bagavato respondis:

“Dioj el la dek direktoj⁵⁷ kunvenis por renkonti la Tatagaton. En la salaĵo arbaro en Kuŝinagaro, kiu havas la periferion de 12 joĝanoj⁵⁸, svarmas majestaj dioj; tie restas neniom da spaceto disponebla. Kaj ili plendas: ‘Ni venis ĉi tien el fora loko spite ĉiajn barojn por renkonti la Tatagaton. Estas treege rare, ke Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato aperas en la mondo. Hodiaŭ en la profunda nokto la Tatagato estas enironta en nirvanon, kaj tamen tiu ĉi bikŝuo majesta, starante antaŭ la Bagavato, ne lasas nin vidi la Tatagaton en la lasta momento.’”

(71) “En kia stato, Majstro opinias, estas la dioj?”

⁵⁶ Palie *mandārava*. Laŭ la hinda mitologio floro en dia (ĉiela) mondo. Ĝia modelo estas hinda eritrino (sciencia nomo: *Erythrina variegata*)

⁵⁷ La budhisma kosmo esprimita per la jenaj dek direktoj: oriento, sudo, okcidento, nordo, nord-oriento, sud-oriento, sud-okcidento, nord-okcidento, supro, subo.

⁵⁸ Longunuo de antikva Hindio. 1 joĝano egalas al ĉ. 12 kilometroj.

“La dioj en la spaco kaj sur la tero, pensante pri la tero, ploras kun malordigita hararo kaj kun siaj brakoj etenditaj, falis surteren kvazaŭ puŝfaligita kaj ruliĝas de flanko al flanko; ili lamentas: ‘La Bagavato tro frue eniras en nirvanon. La Forlasinto tro frue eniras en nirvanon. La Monda Okulo tro frue malaperas.’ Sed la dioj, kiuj forlasis alkroĉiĝon, tenante atentemon kaj klaran komprenon, estas trankvilaj, ĉar ili scias: ‘Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj. Kiel povus esti escepto kun la Bagavato?’”

(72) “Majstro, ĝis nun bikŝuoj venis renkonti la Tatagaton, fininte intensivajn ekzercadon dum pluva sezono, el diversaj lokoj. Tiukaze ni povis renkonti kaj servi elkore respektindajn bikŝuojn. Sed kiam la Bagavato forpasos, ni ne povos renkonti nek servi ilin.”

“Por bonedukitoj, kiuj havas fidon, troviĝas la kvar lokoj vizitindaj kaj kaŭzantaj kortuŝon. Kio estas la kvar?”

“La unua estas la loko, en kiu la Tatagato naskiĝis. La dua estas la loko, en kiu la Tatagato akiris la plej superan vervekiĝon. La tria estas la loko, en kiu la Tatagato rulis la plej superan darmoradon. La kvara estas la loko, en kiu la Tatagato eniris en nirvanon sen resto.”

“Bikŝuoj, bikŝuinoj, upasakoj kaj upasakinoj, kiuj havas fidon, certe vizitos tiujn lokojn, ĉar ĉiuj pilgrimantoj kun purigita menso renaskiĝos en la ĉiela mondo post korpa morto.”

(73) “Majstro, kiel ni devas konduti al virinoj?”

“Ne vidu ilin.”

“Sed se ni hazarde vidas ilin?”

“Ne alparolu ilin.”

“Sed se ni devas paroli kun ili?”

“Firmigu vian atentemon.”

(74) “Majstro, kiel ni devas trakti la korporestaĵon de la Tatagato?”

“Vi ne okupiĝu pri funebraĵo de la korporestaĵo de la Tatagato. Vi devas strebi al la vera celo, okupi vin nur je la vera celo, diligente kaj fervore marŝi al la vera celo. Rilate funebraĵon de la korporestaĵo de la Tatagato respondecos reĝfamilianoj, bramanoj aŭ riĉuloj, kiuj estas saĝaj kaj havas sinceran fidon al la Tatagato.”

(75) “Majstro, kiel ili devas trakti la korporestaĵon de la Tatagato?”

“Ili devas trakti ĝin kiel la korporestaĵon de Sankta Reĝo⁵⁹.”

“Kiel, do, ili devas trakti la korporestaĵon de Sankta Reĝo?”

“Unue volvu la korporestaĵon per nova ŝtofo. Poste volvu la volvitaĵon per bone maleita kotonaĵo. Poste denove volvu la volvitaĵon per nova ŝtofo. Tiamaniere kvincentoble volvu la korporestaĵon. Poste metu ĝin en feran cisternon plenan de aromoleo. Kaj kovru ĝin per alia fera cisterno. Faru brullignojn bonodorajn je ĉiaspecaj aromoj, per kiuj kremaci la korporestaĵon. Poste starigu stupaon por Sankta Reĝo ĉe granda vojkrucio. Jen estas la maniero de traktado por la korporestaĵo de Sankta Reĝo.”

“Tiel same traktu la korporestaĵon de la Tatagato. La stupao por la Tatagato stariĝu ĉe granda vojkrucio. Tiuj, kiuj tie oferos girlandojn, aromaĵojn aŭ farbojn, faros riverencon kaj purigos sian menson, povos havi utilon kaj trankvilon dum longa tempo.”

(76) “Jenaj kvar specoj de homoj meritas stupaon. La unua, Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato; la dua, privata budho⁶⁰; la tria, disĉiplo de Tatagato; la kvara, Sankta Reĝo.”

“Kial Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato meritas stupaon? Multaj homoj rigardante stupaon kaj pensas: «Tio ĉi estas la stupao de la Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato.» Ili tie purigas sian menson kaj renaskiĝas en la ĉiela mondo, bona sfero, postmorte. Tial Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato meritas stupaon.”

“Tiel same, ankaŭ privata budho, disĉiplo de Tatagato kaj Sankta Reĝo meritas stupaon.”

(77) Anando eniris en viharon⁶¹. Apogante sin al la pordo, li staris ploranta. “Ve, mi estas tiu, kiu devas ankoraŭ daŭrigi lernadon. Mi havas multon farendan. Sed mia Majstro kompatanta min estas enironta en nirvanon.”

Tiam la Bagavato alparolis la bikŝuojn, “Kie estas Anando?”

⁵⁹ Palie *rājā cakkavatti*, laŭlitere reĝo rado-turnanto. En antikva Hindio ĝi estis rigardata kiel ideala reganto, kiu unuigas la tutan mondon. En budhismo la idealo iom ŝanĝiĝis: nome, reĝo, kiu unuigas kaj regas la mondon ne per armeo sed per darmo.

⁶⁰ Palie *paccekabuddha*. Tiu, kiu vervekiĝis kaj fariĝis Budho per sia propra forto sen instruo de alia Budho. Tiu ĉi Budho ĝenerala ne predikas, ĉar tiu emas silenton kaj kvieton sen rilati al aliaj homoj.

⁶¹ Palie *vihāra*. Dom(et)o por bikŝuoj. “Esperanto-Japana Vortaro” uzas “vihalo”-n. Ĝi estas erara transskribo el *vihāra*.

“Anando eniris en viharon. Apogante sin al la pordo, li staras ploranta. ‘Ve, mi estas tiu, kiu devas ankoraŭ daŭrigi lernadon. Mi havas multon farendan. Sed mia Majstro kompatanta min estas enironta en nirvanon.’”

La Bagavato alparolis unu bikŝuon, “Transdonu al Anando miajn vortojn: ‘La Majstro vokas vin.’”

Li respondis, “Jes, Majstro.” Kaj li alproksimiĝis al Anando kaj diris, “Anando, la Majstro vokas vin.”

Anando respondis, “Jes, amiko mia”. Kaj li alproksimiĝis al la Bagavato. Post riverenco li sidiĝis flanke de la Bagavato, kiu diris al li:

“Ĉesu, Anando. Vi devas ne malĝoji. Vi devas ne lamenti. Ĝis nun mi predikadis: ‘Ĉia ajn amato kaj favorato nepre disiĝas de ni, ĉu vive aŭ morte, kaj aliformiĝas.’ Io estiĝinta, formiĝinta kaj komponita nepre pereas. Ne estas racie deziri, ke io kun tia eco ne pereu.

Anando, vi dum longa tempo bonvolis servi al la Tatagato per via korpa karmo, per via parola karmo, kaj per via mensa karmo, ĉiu el kiuj estas profitodona, trankviliga, pura, nekalkulebla kaj kompatema.

Ĝis nun vi akumuladis virtojn. Klopodu kaj strebu. Vi baldaŭ konkeros viajn kleŝojn.”

(78) La Bagavato diris al la bikŝuoj:

“Ankaŭ en la estinta periodo Arahantoj-Vervekiĝintoj-Bagavatoj havis la plej bonan servanton, same kiel mi Anandon.”

“Ankaŭ en la estonta periodo Arahantoj-Vervekiĝintoj-Bagavatoj havos la plej bonan servanton, same kiel mi Anandon.”

“Anando estas saĝulo. Li bone juĝas: ‘Taŭga tempo, en kiu bikŝuoj, bikŝuinoj, upasakoj aŭ upasakinoj renkontu la Tatagaton, estas tiu aŭ tiu. Taŭga tempo, en kiu reĝoj, ministroj, alireligiaj gvidantoj aŭ iliaj disĉiploj renkontu la Tatagaton, estas tiu aŭ tiu.’”

(79) “Anando posedas la kvar mirindajn karakterizaĵojn. Kio estas la kvar?”

“Kiam bikŝuoj venas renkonte al Anando, ilia menso estas kontentigita. Kiam Anando parolas pri darmo, ilia menso estas kontentigita per lia parolo, kiu ne enuigas ilin. Tiam Anando eksilentas.” [1]

“Tiel same, kiam bikŝuinoj, upasakoj aŭ upasakinoj venas renkonte al Anando, ilia menso estas kontentigita. Kiam Anando parolas pri darmo, ilia menso estas kontentigita per lia parolo, kiu ne enuigas ilin. Tiam Anando eksilentas.” [2][3][4]

“Sankta Reĝo ankaŭ posedas la kvar mirindajn karakterizaĵojn. Kio estas la kvar? Kiam reĝfamilianoj, bramanoj, riĉuloj aŭ bikŝuoj venas renkonte al Sankta Reĝo, ilia menso estas kontentigita per la renkontiĝo. Kiam Sankta Reĝo parolas, ilia menso estas kontentigita per la parolo, kiu ne enuigas ilin. Tiam Sankta Reĝo eksilentas.”

“Same kiel Sankta Reĝo, Anando posedas la kvar mirindajn karakterizaĵojn. Kio estas la kvar? Kiam bikŝuoj, bikŝuinoj, upasakoj aŭ upasakinoj venas renkonte al Anando, ilia menso estas kontentigita per la renkontiĝo. Kiam Anando parolas pri darmo, ilia menso estas kontentigita per la parolo, kiu ne enuigas ilin. Tiam Anando eksilentas.”

“Jen estas la kvar mirindaj karakterizaĵoj de Anando.”

(80) Tiel aŭskultinte, Anando diris al la Bagavato:

“Majstro, bonvolu eniri en nirvanon ne en tiu ĉi urbo malgranda, neprospera kaj ĉirkaŭa. Troviĝas aliaj pli grandaj urboj, ekzemple, Ĉampa, Raĝagriho, Savatto, Saketo, Kosambo, Baranaso. Bonvolu eniri en nirvanon en ĉi tia loko, kie multe da reĝfamilianoj, bramanoj kaj riĉuloj havas sinceran fidon al la Tatagato. Ili faros funebraĵon de la korporestaĵo de la Tatagato.”

“Ne diru tiel. Ne diru, ‘urbo malgranda, neprospera kaj ĉirkaŭa’.

En la pasinta periodo estis la reĝo nomata Maha-Sudassana. Li kiel Sankta Reĝo, kiel justa reganto, kiel darma reĝo, kiel estro de ĉiuj periferioj, kiel konkeranto, stabiligis sian landon kaj posedis la sep juvelojn.

Tiu ĉi Kuŝinagaro estis la ĉefurbo de Maha-Sudassana kaj estis nomata Ksavato. Ĝi longis 12 joĝanojn orient-okcidente kaj larĝis 7 joĝanojn nord-sude. Ksavato estis prospera kaj riĉa, estis plena de homoj kaj manĝaĵoj. Tio estis same kiel Alakamando, la ĉefurbo de dioj. En Ksavato senĉese aŭdeblis dek specoj de sonoj, nome de elefanto, ĉevalo, ĉaro, tamburo, tambureto, liuto, cimballo, cimbalto, kaj laste krio ‘manĝu, trinku, maĉu!’

Anando, nun vi iru al Kuŝinagaro kaj diru al mallanoj⁶², ‘En tiu ĉi malfrua nokto okazos la ennirvaniĝo de la Tatagato. Venu vidi la Tatagaton, por ke vi poste ne bedaŭru: «En nia vilaĝo okazis la ennirvaniĝo de la Tatagato. Sed ni ne povis vidi la Tatagaton en la lasta momento.»’”

“Jes, Majstro.”

Kaj Anando, vestinte sin per roboj kaj preninte bovlon, iris al Kuŝinagaro kun alia bikŝuo.

⁶² Anoj de la regno Mallo

(81) Ĝuste tiam mallanoj en Kuŝinagaro havis kunsidon pri iu grava afero en la kunvenhalo.

Anando alproksimiĝis al la halo, en kiu li diris al la mallanoj:

“En tiu ĉi malfrua nokto okazos la ennirvaniĝo de la Tatagato. Venu vidi la Tatagaton, por ke vi poste ne bedaŭru: «En nia vilaĝo okazis la ennirvaniĝo de la Tatagato. Sed ni ne povis vidi la Tatagaton en la lasta momento.»”

La mallanoj, inkluzive de junuloj kaj virinoj, afliktiĝis, malĝojis kaj deprimiĝis. Kelkaj el ili ploris kun malordigita hararo kaj kun siaj brakoj etenditaj, falis surteren kvazaŭ puŝfaligita kaj ruliĝis de flanko al flanko; ili lamentis:

“La Bagavato eniros en nirvanon tro frue. La Monda Okulo malaperos tro frue.”

La mallanoj, inkluzive de junuloj kaj virinoj, kun aflikto, maltrankvilo kaj mensa doloro alproksimiĝis al Anando, kiu revenis en la salaa arbaro.

Anando diris al si: “Se mi permesos al ĉiu el mallanoj po unu riverenci, jam tagiĝos, antaŭ ol ĉiuj riverencos. Estas pli bone, ke mi grupigu ilin en familion kaj permesu al ĉiu familio riverenci, prezentante ĉiun familion al la Bagavato: «Majstro, jen tiu ĉi mallano nomata tiu aŭ tiu kun siaj edzino, gefiloj, sekvantoj kaj amikoj volas meti sian kapon ĉe la piedoj de la Bagavato kaj riverenci.»”

Kaj li plenumis sian ideon kaj tiamaniere ĉiuj mallanoj en Kuŝinagaro povis riverenci la Bagavaton en la frua nokto de la tago.

(82) Ĝuste tiam Subhadda, migranta ŝramano, restis en Kuŝinagaro. Li aŭdis, “En tiu ĉi malfrua nokto okazos la ennirvaniĝo de la Tatagato.”

Li pensis ĉi tiel: “Mi iam aŭdis de maljunaj kaj veteranaj ŝramanoj, ke iam aperos en tiu ĉi mondo Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato. Oni diras, ke en tiu ĉi malfrua nokto okazos la ennirvaniĝo de la ŝramano Gotamo. Mi havas dubojn pri darmo. Sed mi kredas, ke la ŝramano Gotamo povos forigi miajn dubojn.”

Subhadda alproksimiĝis al Anando, kiu restis en la salaa arbaro.

Li diris: “Mi iam aŭdis de maljunaj kaj veteranaj ŝramanoj, ke iam aperos en tiu ĉi mondo Arahanto-Vervekiĝinto-Tatagato. Oni diras, ke en tiu ĉi malfrua nokto okazos la ennirvaniĝo de la ŝramano Gotamo. Mi havas dubojn pri darmo. Sed mi kredas, ke la ŝramano Gotamo povos forigi miajn dubojn. Mia amiko Anando, bonvolu permesi al mi renkontiĝi kun la ŝramano Gotamo.”

Anando respondis: “Ĉesu, mia amiko Subhadda. Ne ĝenu la Bagavaton. La Tatagato estas laca.”

Subhadda ripetis sian peton la duan kaj la trian fojojn.

Anando ĉiun fojon diris: “Ĉesu, mia amiko Subhadda. Ne ĝenu la Bagavaton. La Tatagato estas laca.”

(83) La Bagavato aŭdis la interparolon inter Anando kaj Subhadda. La Bagavato diris al Anando:

“Ĉesu, Anando. Ne rifuzu Subhaddan. Li renkontiĝu kun la Tatagato. Li volas demandi min, ne kun la intenco ĝeni sed kun la intenco scii. Li certe komprenos mian respondon al liaj demandoj.”

Anando diris al Subhadda, “Iru, Subhadda. La Bagavato donis al vi ŝancon.”

Subhadda alproksimiĝis al la Bagavato. Post interŝanĝo de ĝentila saluto kun la Bagavato kaj impresigaj agrablaj vortoj, li sidiĝis flanke kaj diris al la Bagavato:

“Majstro Gotamo, troviĝas jenaj ŝramanoj aŭ bramanoj, kiuj gvidas eklezion aŭ komunumon, kaj kiuj estas bone konataj kiel gvidantoj, honoratoj, iniciatintoj, kaj respektataj kiel bonuloj de multaj homoj: nome, Purana Kassapa, Makkali Gosala, Aĵita Kesakambala, Pakudha Kaĉĉajana, Sanĵaja Belatthiputta, kaj Nigantha Nataputta.⁶³ Ĉu ĉiuj ĉi vervekiĝis, kiel ili asertas pri si? Aŭ ĉu neniu el ili vervekiĝis? Aŭ ĉu iuj vervekiĝis kaj aliaj ne?”

“Ĉesu, Subhadda. Lasu vian demandon for. Mi prediku al vi la darmon. Bone aŭskultu kaj pripensu ĝin. Mi parolu.”

“Jes, Majstro.”

(84) “En la darmo kaj vinajo, en kiuj ne ekzistas la okera nobla vojo⁶⁴, oni ne vidas la unuajn ŝramanojn, la duajn ŝramanojn, la triajn ŝramanojn kaj la kvarajn ŝramanojn.⁶⁵ Sed en la darmo kaj vinajo, en kiuj ekzistas la okera nobla vojo, oni vidas la unuajn ŝramanojn, la duajn ŝramanojn, la triajn ŝramanojn kaj la kvarajn ŝramanojn.”

“En la darmo kaj vinajo, kiujn mi instruas, ekzistas la okera nobla vojo. Nur ĉi tie oni vidas la unuajn ŝramanojn, la duajn ŝramanojn, la triajn ŝramanojn kaj la kvarajn ŝramanojn. Al aliaj diversaj opinioj mankas ŝramanoj. Se tiuj ĉi ŝramanoj, nome bikŝuoj, troviĝas en la mondo, al ĝi ne mankas arahantoj.”

⁶³ Ĉi tie listigitaj ses ŝramanoj estis nomataj “la ses majstroj eksteraj”. “Ekstera” ĉi tie signifas “ne-budhisma” aŭ “ne-brahmismo”. Ili estis liberpensuloj kaj havis sian propran doktrinon. Interalie Nigantha Nataputta estas konata kiel fondinto de ĝajnismo.

⁶⁴ vd. la piednoton de la 54a paragrafo.

⁶⁵ Temas pri fluo-enirinto, unufoja-revenonto, ne-revenonto kaj arahanto. Vidu la piedonojn de la 27a paragrafo.

“Mi en la aĝo de 29 jaroj
Forlasis mian hejmon, serĉante bonon.
Post kiam mi forlasis la hejmon,
Pasis kvindek kaj kelkaj jaroj.
Mi paŝadis sur la vojo de ĝusta darmo.
Ekster ĝusta darmo ne troviĝas ŝramanoj.”

“Ankaŭ ne troviĝas la duaj ŝramanoj, nek la triaj ŝramanoj, nek la kvaraj ŝramanoj. Al aliaj diversaj opinioj mankas ŝramanoj.”

(85) Tiel aŭskultinte, Subhadda diris al la Bagavato:

“Majstro, estas brile. Estas vere brile. La Bagavato bonvolis instrui la darmon per multaj manieroj, kvazaŭ oni starigus falinton, forprenus kovraĵojn, montrus vojon al vojperdinto, aŭ tenus torĉon en mallumo por ke okulhavantoj povu vidi aĵojn. Majstro, num mi rifuĝas al la Budho, mi rifuĝas al la darmo, mi rifuĝas al la samgo. Majstro, bonvolu permesi, ke mi povu bikŝuiĝi sub la gvido de la Tatagato.”

“Tiu, kiu antaŭe estis ŝramano de alia instruo, devas loĝi aparte de aliaj bikŝuoj dum kvar monatoj. Post tiuj kvar monatoj, se aliaj bikŝuoj aprobas, li estas akceptita kiel membro de la samgo. Tamen mi diru, ke tio dependas de la homo, kaj la finfinan juĝon mi faras.”

“Majstro, se tiu, kiu antaŭe estis ŝramano de alia instruo, devas loĝi aparte de aliaj bikŝuoj dum kvar monatoj, mi volonte loĝos aparte de aliaj bikŝuoj dum eĉ kvar jaroj.”

Tiam la Bagavato diris al Anando, “Bone. Subhadda nun bikŝuiĝu.”

“Jes, Majstro.”

Kaj Subhadda diris al Anando:

“Estas por vi merito, amiko mia, estas por vi gajno, ĉar la Majstro aprobis, ke vi plenumu la bikŝuigan procedon.”

Kaj Subhadda estis aprobita kiel bikŝuo kaj fariĝis samgano. Li tuj ekloĝis sola, kaj diligente kaj entuziasme komencis sian ekzercadon. Baldaŭ li bone eksciis, mem spertis kaj realigis en tiu ĉi mondo la rezulton de la sensupera pura praktikado, kiun faras ŝramanoj, forlasinte sian bonstatan familion. Li ekkonis: «Jen estas mia lasta vivo. Mia pura praktikado estas plenumita. Ĉio farenda estas elfarita. Mi ne plu renaskiĝos.»

Subhadda fariĝis arahanto.

Li estis la lasta disĉiplo de la Bagavato.

[6. la Forpaso]

(86) La Bagavato alparolis Anandon:

“Eble vi pensas: «La instruo perdis la gvidanton. Al ni mankas la gvidanto.» Sed ne pensu tiamaniere. Post mia forpaso la darmo kaj la vinajo, kiujn mi montris kaj fiksis al vi, estas ekde nun via gvidanto.”

“Nun vi bikŝuoj vokas unu la alian per la vorto «amiko». Sed post mia forpaso ne voku tiamaniere. Veteranaj bikuŝuoj voku novicojn per ilia nomo aŭ per «amiko», sed novicoj voku veteranojn per «respektinda sinjoro» aŭ «sinjoro».”

“Post mia forpaso la samgo povos nuligi bagatelajn regulojn, se ĝi deziras.”

“Post mia forpaso vi povos doni puran punon al la bikŝuo Ĉanna⁶⁶.”

“Majstro, sed kion signifas pura puno?”

“Ĉanna povas paroli tiel, kiel li volas. Sed aliaj bikŝuoj ne alparolu lin, nek admonu aŭ instruu lin.”

(87) La Bagavato diris al la bikŝuoj:

“Se inter vi bikŝuoj eĉ unu havas dubon pri la Budho, pri la darmo, pri la samgo, pri la vojo aŭ pri la praktiko, senhezite demandu. Ne pentu poste, dirante, ‘Kvankam nia Majstro estis antaŭ ni, ni ne povis rekte demandi la Bagavaton.’”

Malgraŭ tiu ĉi kuraĝigo la bikŝuoj restis silentaj.

La Bagavato ankoraŭfoje kaj triafoje diris:

“Se inter vi bikŝuoj eĉ unu havas dubon pri la Budho, pri la darmo, pri la samgo, pri la vojo aŭ pri la praktiko, senhezite demandu. Ne pentu poste, dirante, ‘Kvankam nia Majstro estis antaŭ ni, ni ne povis rekte demandi la Bagavaton.’”

La bikŝuoj restis plu silentaj.

La Bagavato diris:

“Se vi ne kuraĝas demandi pro respekto al la Majstro, vi bikŝuoj, demandu min por aliaj kolegoj.”

La bikŝuoj restis silentaj.

Anando diris al la Bagavato:

⁶⁶ Ĉanna estis iama ĉaristo de Ŝakjamunio, kiu akompanis lin ĝis duonvoje okaze de lia ŝramaniĝo. Poste li iĝis bikŝuo. Sed ĉar li tro fieris pri sia rekta rilato kun la Budho kaj ne povis harmoniiĝi kun aliaj bikŝuoj, li estis efektive sankciita post la forpaso de Ŝakjamunio. Pliposte tamen li tuj memkritikis sin kaj fariĝis arahanto.

“Estas mirinde, estas rare. Mi pensas, ke neni bikŝuo en tiu ĉi samgo havas dubon pri la Budho, pri la darmo, pri la samgo, pri la vojo aŭ pri la praktiko.”

“Anando, vi diras tiel nur pro via pura koro. Sed la Tatagato certe scias pro rezono, ke neni bikŝuo en tiu ĉi samgo havas dubon pri la Budho, pri la darmo, pri la samgo, pri la vojo aŭ pri la praktiko, ĉar inter tiuj ĉi kvincent bikŝuoj eĉ la malplej progresinta fariĝos fluo-enirinto, kiu estas sekura kontraŭ pereco kaj certigita kaj ligita al vervekiĝo.”

(88) La Bagavato diris al la bikŝuoj:

“Vi bikŝuoj, nun mi diras al vi: ‘Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj. Tial vi fervore klopodu.’”

Jen estas la testamento de la Tatagato.

(89) Post tio la Bagavato eniris en la unuan samadion⁶⁷, poste elirinte el la unua samadio eniris en la duan samadion, poste elirinte el la dua samadio eniris en la trian samadion, poste elirinte el la tria samadio eniris en la kvaran samadion, poste elirinte el la kvara samadio eniris en la samadion de senlima spaco, poste elirinte el la samadio de senlima spaco eniris en la staton de senlima konscio, poste elirinte el la stato de senlima konscio eniris en la staton de ne-ekzisto, poste elirinte el la stato de ne-ekzisto eniris en la staton de ne-ekzisto de ideo kaj ne-ne-ekzisto de ideo, kaj fine elirinte el la stato de ne-ekzisto de ideo kaj ne-ne-ekzisto de ideo eniris en la staton de plena malapero de konscio-kono.

Tiam Anando demandis Anurudon, “Ĉu la Bagavato jam eniris en nirvanon?”

“Ne, la Bagavato ne eniris en nirvanon sed eniris en la samadion de plena malapero de konscio-kono.”

Poste la Bagavato elirinte el la samadio de plena malapero de konscio-kono eniris en la staton de ne-ekzisto de ideo kaj ne-ne-ekzisto de ideo, poste elirinte el la stato de ne-ekzisto de ideo kaj ne-ne-ekzisto de ideo eniris en la staton de ne-ekzisto, poste elirinte el la stato de ne-ekzisto eniris en la staton de senlima konscio, poste elirinte el la stato de senlima konscio eniris en la

⁶⁷ Palie *samādhi*. La mensa stato aŭ la mensa funkcio, kiu estas trankvila kaj stabila, kaj kiun oni foje atingas uzante la metodon de zeno. Tio ĉi havas entute naŭ stadiojn, kiel la teksto montras. La unuaj kvar stadioj estas atingeblaj en la sfero, kie oni neniigis ĉiujn dezirojn. La sekvaj kvar stadioj estas atingeblaj en la pli alta sfero, kie ĉiuj materioj estingiĝis kaj troviĝas nur mensa funkcio. La lasta (la naŭa) stadio signifas la staton, en kiu eĉ menso neniigas, aŭ nirvanon kun resto.

staton de senlima spaco, poste elirinte el la stato de senlima spaco eniris en la kvaran samadion, poste elirinte el la kvara samadio eniris en la trian samadion, poste elirinte el la tria samadio eniris en la duan samadion, poste elirinte el la dua samadio eniris en la unuan samadion, poste elirinte el la unua samadio eniris en la duan samadion, poste elirinte el la dua samadio eniris en la trian samadion, kaj poste elirinte el la tria samadio eniris en la kvaran samadion.

Fine la Bagavato eliris el la kvara samadio kaj tuj eniris en plenan nirvanon.

(90) Kiam la Bagavato ennirvaniĝis, ĝuste tiam okazis terura kaj harhirtiga tertremego kaj tondris.

Kiam la Bagavato ennirvaniĝis, ĝuste tiam la brahmao Sahampati ĉantis la jenan version:

Ĉiu, kiu vivas en tiu ĉi mondo,
Devas iam forlasi sian korpon.
Eĉ la senkomparebla Majstro,
La Vervekiĝinto kun la fortoj de saĝo,
La Tatagato ennirvaniĝis,
Forlasinte sian korpon.

(91) Kiam la Bagavato ennirvaniĝis, ĝuste tiam Sakka, la reĝo de dioj⁶⁸, ĉantis la jenan version:

Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj.
Ili, havante la econ de estiĝo kaj malestiĝo,
Ja estiĝas kaj malestiĝas.
Ilia ĉeso estas paca trankvilo.

(92) Kiam la Bagavato ennirvaniĝis, ĝuste tiam respekinda Anurudo ĉantis la jenan version: dharmo darmo budho budao

La Sanktulo sen avideco
Forpasis en plenan nirvanon.
Al la Majstro stabiliginta sian menson
Jam ne okazas spirado.
La Majstro eltenis la doloron
Kun sia menso ne retroiranta.

⁶⁸ Nome la dio Indro. Laŭ budhisma vidpunkto brahmao(j) kaj Indro estas la du plej konataj gardantoj de budhismo.

Kvazaŭ lampo estingiĝus,
La mensa liberiĝo estiĝis.

(93) Kiam la Bagavato ennirvaniĝis, ĝuste tiam respekinda Anando ĉantis la jenan version:

Tiam okazis teruraĵoj,
Tiam okazis harhirtigaĵoj,
Kiam la Vervekiĝinto ennirvaniĝis
Posedanta ĉiajn bonajn aspektojn.

(94) Kiam la Bagavato ennirvaniĝis, kelkaj bikŝuoj, kiuj ankoraŭ ne forlasis alkroĉiĝon, ploregis kun siaj brakoj etenditaj, ĵetis sin surteren kaj ruliĝis de flanko al flanko; ili lamentis: "La Bagavato tro frue eniris en nirvanon. La Forlasinto tro frue eniris en nirvanon. La Monda Okulo tro frue malaperis."

Sed la aliaj bikŝuoj, kiuj forlasis alkroĉiĝon, tenante atentemon kaj klaran komprenon, estis trankvilaj, ĉar ili sciis: "Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj. Kiel povus esti escepto kun la Bagavato?"

(95) Tiam respektinda Anurudo diris al la bikŝuoj:

"Ĉesu, amikoj! Vi devas ne esti malĝojaj. Vi devas ne lamenti. La Bagavato ĝis nun predikadis, 'Ni nepre apartiĝas, ĉu vive aŭ morte, de niaj karuloj aŭ amatoj, kaj ni loĝos en aliaj sferoj postmorte.'

Amikoj, kiel eblus, ke estiĝintaĵoj, formitaĵoj kaj faritaĵoj, kiuj havas la econ de detruigo, ne estu detruitaj? La dioj grumblas pri vi."

"Kiel, vi respektinda Anurudo opinias, statas dioj?"

"Mia amiko, Anando, kelkaj dioj en la ĉielo kaj sur la tero, pensante pri la tero, ploras kun malordigita hararo kaj kun siaj brakoj etenditaj, falis surteren kvazaŭ puŝfalgita kaj ruliĝas de flanko al flanko; ili lamentas: 'La Bagavato tro frue eniris en nirvanon. La Forlasinto tro frue eniris en nirvanon. La Monda Okulo tro frue malaperis.' Sed la aliaj dioj, kiuj forlasis alkroĉiĝon, tenante atentemon kaj klaran komprenon, estas trankvilaj, ĉar ili scias: 'Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj. Kiel povus esti escepto kun la Bagavato?'"

Poste Anurudo kaj Anando pasigis la restantan nokton per interparolo pri darmo.

(96) Anurudo diris al Anando:

"Mia amiko, Anando, bonvolu iri al Kuŝinagaro kaj diri al tieaj mallanoj, 'La Bagavato eniris en nirvanon. Venu al nia loko iam ajn.'"

“Komprenite.”

Kaj antaŭtagmeze Anando, vestinte sin per roboj kaj preninte bovlon, vizitis Kuŝinagaron kun siaj kolegoj.

Ĝuste tiam la mallanoj estis en la kunvenejo por trakti gravajn aferojn. Anando proksimiĝis al la kunvenejo kaj diris al ili:

“La Bagavato eniris en nirvanon. Venu al nia loko iam ajn.”

Aŭskultinte la parolon de Anando, ĉiuj mallanoj, inkluzive de virinoj kaj junuloj, afliktiĝis, malĝojis kaj deprimiĝis. Kelkaj el ili ploris kun malordigita hararo kaj kun siaj brakoj etenditaj, falis surteren kvazaŭ puŝfaligita kaj ruliĝas de flanko al flanko; ili lamentis:

“La Bagavato tro frue eniris en nirvanon. La Forlasinto tro frue eniris en nirvanon. La Monda Okulo tro frue malaperis.”

(97) La mallanoj ordonis al siaj servistoj jenon:

“Kolektu ĉiujn parfumojn kaj girlandojn en la tuta Kuŝinagaro kaj ankaŭ ĉiaspecajn muzikilojn!”

La mallanoj, kunportante parfumojn, girlandojn, muzikilojn kaj kvincent kompletojn de ŝtofoj, alproksimiĝis al la salaa arbaro en Upavattana, kie kuŝas la korporestaĵo de la Bagavato. Ili tie montris respekton kaj estimon, faris omaĝon kaj oferis siajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la korporestaĵo de la Bagavato; ili ankaŭ starigis tendojn kaj provizoran loĝejon el ŝtofoj por tie pasigi la tutan tagon. La mallanoj ekpensis: «Hodiaŭ estas jam malfrue por kremacii la korporestaĵon de la Bagavato. Morgaŭ ni kremaciu la korporestaĵon de la Bagavato.»

La sekvan tagon la mallanoj denove montris respekton kaj estimon, faris omaĝon kaj oferis siajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la korporestaĵo de la Bagavato, starigis tendojn kaj provizoran loĝejon el ŝtofoj por tie pasigi la tutan tagon.

La trian tagon, la kvaran tagon, la kvinan tagon kaj la sesan tagon ili tiel same pasigis.

Kaj en la sepa tago la mallanoj ekpensis: «Ni montru respekton kaj estimon, faru omaĝon kaj oferu niajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la korporestaĵo de la Bagavato. Poste ni kunportu la korporestaĵon al la sudo laŭ alsuda vojo kaj ekster la urbon laŭ alekster a vojo, por kremacii la korporestaĵon de la Bagavato sude de la urbo.»

(98) Tiam ok gvidantoj de la mallanoj, lavinte sian kapon kaj vestinte sin per nova vestaĵo, provis levi la korporestaĵon de la Bagavato; ili tamen ne sukcesis.

Tiam ili demandis Anurudon: “Ni, lavinte nian kapon kaj vestinte nin per nova vestaĵo, provis levi la korporestaĵon de la Bagavato; ni tamen ne sukcesis. Kio estas la kaŭzo aŭ kondiĉo?”

“Via intenco estas ne sama kiel tiu de dioj.”

“Do, kia estas la intenco de dioj?”

“Via intenco estas ĉi tia: «Ni montru respekton kaj estimon, faru omaĝon kaj oferu niajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la korporestaĵo de la Bagavato. Poste ni kunportu la korporestaĵon al la sudo laŭ alsuda vojo kaj ekster la urbon laŭ alekster a vojo, por kremacii la korporestaĵon de la Bagavato sude de la urbo.» Sed la intenco de dioj estas ĉi tia: «Ni montru respekton kaj estimon, faru omaĝon kaj oferu diajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la korporestaĵo de la Bagavato. Poste ni kunportu la korporestaĵon al la nordo laŭ alnorda vojo, poste tra la norda pordo internen de la urbo, poste al la centro laŭ alcentra vojo, kaj fine tra la orienta pordo al la oriento, t.e. al la sanktejo nomata Makuta-bandhana de Mallo, por tie kremacii la korporestaĵon de la Bagavato.»”

“Ni faru tiel, kiel dioj intencas.”

(99) Tiam Kuŝinagaro estis kovritaj per florpetaloj de la ĉiela mandaravo tiom multe, ke ilia tavolo atingis homajn genuojn; ankaŭ murbreĉoj, fosaĵoj kaj rubejoj estis plenaj de ili.

Dioj kaj mallanoj montris respekton kaj estimon, faris omaĝon kaj oferis diajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la korporestaĵo de la Bagavato. Poste ili kunportis la korporestaĵon al la nordo laŭ alnorda vojo, poste tra la norda pordo internen de la urbo, poste al la centro laŭ alcentra vojo, kaj fine tra la orienta pordo al la oriento, t.e. al la sanktejo nomata Makuta-bandhana de Mallo. Ĉi tie la korporestaĵo de la Bagavato estis metita.

(100) La mallanoj en Kuŝinagaro diris al Anando:

“Kiel ni devas trakti la korporestaĵon de la Tatagato?”

“Vi devas trakti ĝin kiel la korporestaĵon de Sankta Reĝo.”

“Kiel, do, ni devas trakti la korporestaĵon de Sankta Reĝo?”

“Unue volvu la korporestaĵon per nova ŝtofo. Poste volvu la volvitaĵon per bone maleita kotonaĵo. Poste denove volvu la volvitaĵon per nova ŝtofo. Tiamaniere kvincentoble volvu la korporestaĵon. Poste metu ĝin en feran cisternon plenan de aromoleo. Kaj kovru ĝin per alia fera cisterno. Amasigu brullignojn bonodorajn je ĉiaspecaj aromoj, kaj per ili kremaciu la

corporestaĵon. Poste starigu stupaon por Sankta Reĝo ĉe granda vojkrucio. Jen estas la maniero de traktado por la corporestaĵo de Sankta Reĝo.”

“Tiel same traktu la corporestaĵon de la Tatagato. La stupao por la Tatagato stariĝu ĉe granda vojkrucio. Tiuj, kiuj tie oferos girlandojn, aromaĵojn aŭ farbojn, faros riverencon kaj purigos sian menson, povos havi bonfarton kaj feliĉon por longa tempo.”

La mallanoj ordonis al siaj servistoj: “Vi kolektu bone maleitajn kotonaĵojn.”

La corporestaĵo de la Bagavato estis tiamaniere metita sur kremaciajn brullignojn bonodorajn je ĉiaspecaj aromoj.

(101) Ĝuste tiam respektinda Mahakasapo paŝadis sur la vojo de Pavo al Kuŝinagaro kune kun kvincent bikŝuoj.

Mahakasapo devojiĝis kaj sidiĝis sub iu arbo. Tiam ano de aĵivakismo⁶⁹ paŝadis sur la vojo de Kuŝinagaro al Pavo, portante la floron de mandaravo. Mahakasapo vidis lin alproksimiĝi kaj demandis lin:

“Ĉu vi scias, kiel estas nia majstro?”

“Jes. La ŝramano Gotamo ennirvaniĝis antaŭ sep tagoj. Mi enmanigis tiun ĉi mandaravan floron de tiu loko.”

Kelkaj bikŝuoj, kiuj ankoraŭ ne forlasis alkroĉiĝon, ploregis kun siaj brakoj etenditaj, ĵetis sin surteren kaj ruliĝis de flanko al flanko; ili lamentis: “La Bagavato tro frue eniris en nirvanon. La Forlasinto tro frue eniris en nirvanon. La Monda Okulo tro frue malaperis.”

Sed aliaj bikŝuoj, kiuj forlasis alkroĉiĝon, tenante atentemon kaj klaran komprenon, estis trankvilaj, ĉar ili sciis: “Ĉiuj formitaĵoj estas malkonstantaj. Kiel povus esti escepto kun la Bagavato?”

(102) Tiam Subhadda⁷⁰, kiu fariĝis bikŝuo en sia maljuneco, estis inter la bikŝuoj gvidataj de Mahakasapo. Li diris al aliaj bikŝuoj:

“Ĉesu, amikoj! Ne endas afliktiĝi. Ne endas lamenti. Ni estas liberigitaj de tiu granda ŝramano. Li diradis al ni, ke tio estas bona al ni, aŭ ke tio ne estas bona al ni, kaj tiamaniere ĉagrenadis nin. Sed nun ni povas fari ion ajn, kio plaĉas al ni, kaj ne bezonas fari ion, kio ne plaĉas al ni.

Sed Mahakasapo diris al la bikŝuoj:

⁶⁹ Palie *ājīvaka*. Unu el hindaj antikvaj filozofioj, asertita de Makkhali Gosala; ĝi estas fatalismo.

⁷⁰ Ĉi tiu Subhadda estas alia persono ol la same nomata bikŝuo, kiu aperis en la 82-a paragrafo.

“Ĉesu, amikoj! Ne endas afliktiĝi. Ne endas lamenti. La Bagavato ĉiam predikadis: ‘Ĉia ajn amato kaj favorato nepre disiĝas de ni, ĉu vive aŭ morte, kaj aliformiĝas.’ Io estiĝinta, formiĝinta kaj komponita nepre pereas. Ne estas racie deziri, ke io kun tia eco ne pereu.”

(103) Tiam kvar gvidantoj de la mallanoj, lavinte sian kapon kaj vestinte sin per nova vestaĵo, provis fajrigi la brullignojn por kremacii la korporestaĵon de la Bagavato; ili tamen ne sukcesis.

Tiam ili demandis Anurudon: “Ni, lavinte nian kapon kaj vestinte nin per nova vestaĵo, provis fajrigi la brullignojn por kremacii la korporestaĵon de la Bagavato; ni tamen ne sukcesis. Kio estas la kaŭzo aŭ kondiĉo?”

“Via intenco ne estas sama kiel tiu de dioj.”

“Do, kia estas la intenco de dioj?”

“La intenco de dioj estas ĉi tia: «Respektinda Mahakasapo paŝadas sur la vojo de Pavo al Kuŝinagaro kune kun kvincent bikŝuoj. Tiom longe, kiom Mahakasapo ne metas sian kapon ĉe la piedoj de la Bagavato kaj riverencas, la brullignoj ne ekbrulu.»”

“Ni faru tiel, kiel dioj intencas.”

(104) Mahakasapo alproksimiĝis al la sanktejo de mallanoj nomata Makuta-bandhana, kie la brullignoj por la Bagavato estis amasigitaj. Tie li, surmetinte robon sur sian ŝultron, kunmetis siajn manplatojn, ĉirkaŭiris la brullignojn dekstrume tri fojojn, metis sian kapon ĉe la piedoj de la Bagavato kaj riverencis. La aliaj kvincent bikŝuoj sekvis lian ekzemplon.

Post la riverenco de Mahakasapo kaj la kvincent bikŝuoj la brullignoj per si mem ekbrulis.

(105) La korporestaĵo de la Bagavato estis kremaciita. La haŭto, karno, tendeno kaj sinovio tute ne restis; nek ilia cindro nek ilia fulgo. Restis nur la ŝariroj⁷¹. Bruliĝinta butero aŭ oleo ne postlasas sian cindron nek fulgon. Tiel same estis la korporestaĵo de la Bagavato.

Kaj el la ŝtofoj, kiuj volvis kvincentoble la korpon de la Bagavato, nur du, t.e. la plej interna kaj la plej ekstera, restis nebruligitaj.

Post kiam la korporestaĵo de la Bagavato estis kremaciita, akva fluo aperis el la ĉielo kaj estingis la brullignojn. Akvo ŝprucis ankaŭ el la salaaj arboj kaj

⁷¹ Palie *sarīra* kaj sanskrite *śarīra*. La ostoj de Ŝakjamunio. Postaj budhanoj ekhavis la kutimon adori la ostojn de Ŝakjamunio, kaj ili estis rigardataj kiel relikvo. La prototipo de stupao estas tombo entenanta ŝarirojn.

estingis la brullignojn. La mallanoj en Kuŝinagaro ankaŭ estingis la brullignojn per ĉiaspeca aroma akvo.

La mallanoj gardis la ŝarirojn dum sep tagoj en la kunvenejo kun ĉirkaŭbarilo de lancoj kaj kun ĉirkaŭbariero de pafarkoj. Ili tie montris respekton kaj estimon, faris omaĝon kaj oferis siajn dancon, kanton, muzikon, girlandojn kaj parfumojn por la ŝariroj de la Bagavato.

(106) Aĝatasattu, la reĝo de Magado, aŭdis la onidiron, ke la Bagavato ennirvaniĝis en Kuŝinagaro. Li do sendis sian mesaĝiston al la mallanoj de Kuŝinagaro por diri: “La Bagavato iam apartenis al reĝa familio. Ankaŭ mi apartenas al reĝa familio. Tial mi havas rajton ricevi parton de la ŝariroj. Ni konstruos stupaon kaj havos kulton.”

Liĉavianoj de Vajŝalio aŭdis la onidiron, ke la Bagavato ennirvaniĝis en Kuŝinagaro. Ili do sendis sian mesaĝiston al la mallanoj de Kuŝinagaro por postuli la ŝarirojn, same kiel Aĝatasattu.

Ŝakjaanoj de Kapilavastuo⁷² postulis la ŝarirojn, dirante: “La Bagavato estas la plej estimata parenco de nia tribo. Ni havas rajton ricevi parton de la ŝariroj. Ni konstruos stupaon kaj havos kulton.”

Bulajanoj de Allakappa, kolijanoj de Ramagama, bramanoj de Vethadipa kaj mallanoj de Pavo ankaŭ postulis la ŝarirojn.

Sed la mallanoj de Kuŝinagaro respondis: “La Bagavato ennirvaniĝis en nia vilaĝo. Ni ne volas disdoni la ŝarirojn al vi.”

(107) Tiam Dona, bramano, diris al la kolektiĝintoj:

“Aŭskultu min, vi ĉiuj!

Nia Budho predikis paciencon.

Disdono de la ŝariroj de tiu, la plej supera,

Ne alportu malharmonion.

Ni ĉiuj estu harmoniaj,

Kune ĝoju kaj dividu ilin en ok porcioj.

Stupaoj por la ŝariroj disvastiĝu en la mondon!

Ĉiuj homoj fidas la Budhon kun saĝaj okuloj.”

(108) “Se vi diras tiel, estimata bramano, vi mem bonvolu dividi la ŝarirojn en ok egalajn porciojn.”

⁷² Palie *Kapilavasthu*, sanskrite *Kapilavastu*. Ĝi estis la urbo, kie Ŝakjamunio naskiĝis kaj kreskis. Cetere Ŝakjamunio signifas laŭlitere sanktulon de la tribo Ŝakja (palie *Sakja*, sanskrite *Śākya*.).

“Konsentite.”

Dona tiel faris kaj poste diris al la kolektiĝintoj:

“Bonvolu permesi min preni tiun ĉi urnon. Ankaŭ mi volas konstrui stupaon por la urno kaj havi kulton.”

Ili donis la urnon al Dona.

Pli poste, ankaŭ morjanoj de Piphalivana venis peti la ŝarirojn. Sed ĉiuj ŝariroj estis jam disdonitaj. Oni diris al ili:

“Restas neniu parto de la ŝariroj. Bonvolu forpreni de ĉi tie la cindron de la brullignoj.”

(109) Aĝatasattu konstruis stupaon por la ŝariroj de la Bagavato kaj havis kulton.

Tiel same, liĉavianoj de Vajŝalio, ŝakjaanoj de Kapilavastuo, bulajanoj de Allakappa, kolijanoj de Ramagama, bramanoj de Vethadipa, mallanoj de Pavo kaj mallanoj de Kuŝinagaro konstruis stupaon por la ŝariroj de la Bagavato kaj havis kulton.

Dona, bramano, konstruis stupaon por la urno kaj havis kulton.

Morjanoj konstruis stupaon por la cindro kaj havis kulton.

Tiamaniere ekestis la ok stupaoj por la ŝariro, la strupao por la urno kiel la naŭa kaj la stupao por la cindro kiel la deka.

Tiel tio okazis iam.

(110)⁷³

Troviĝas ok donaoj⁷⁴ de la ŝariroj de la Okulhavanto;

En Hindio oni kultas sep donojn.

En la vilaĝo Rama drakreĝoj kultas unu donaon

De la ŝariroj de la Plejsuperulo.

Tridek tri dioj kultas unu denton;

En Gandaro oni kultas unu denton;

En la lando de Kalinga oni kultas unu denton;

Drakreĝoj kultas unu denton.

La tero estas ornamita de la plej bonaj oferaĵoj


Pere de la majesta gloro.

Tiel la ŝariroj de la Okulhavanto

⁷³ Tiu ĉi verso estis poste aldonita fare de bikŝuoj en Srilanko. (La palia kanono, al kiu apartenas tiu ĉi sutro, estis por la unua fojo redaktita kaj litere transskribita en Srilanko, ĉ. 300 jarojn post la forpaso de Ŝakjamunio.)

⁷⁴ Unuo de kapacito. Eble ĝi rilatas al la nomo de ĉi supre menciita bramano?

Estas respektataj kaj kultataj.
 Reĝoj de dioj, de drakoj kaj de homoj
 Kaj la plej eminentaj homoj faras oferon al ili.
 Adoru ilin, kunmetante viajn manplatojn.
 Estas malfacile renkonti Budhon eĉ dum cent kalpoj⁷⁵.



⁷⁵ Palie *kappa* kaj sanskrite *kalpa*. Mitologia unuo de tempo treege longa. Laŭ kalkulo de Johnson, W. J, unu kalpo egalas al ĉ. 16 milionoj da jaroj.